

DE ĈEĤOSLOVAKA ASOCIO ESPERANTISTA

Redakcio kaj administracio:
Praha XIX., Uralské nám. 447.
Telefona n-ro 718-41.

Redaktas:
Dr. ST. KAMARYT, Dr. A. PITLÍK,
O. GINZ.

Senpage por membroj de
Cs. Asocio Esperantista.
Aperas sesfoje dum la jaro.

Kunsidoj de la VI-a Ĉeĥoslovaka kongreso esperantista.

**Solena malferma kunveno
sabaton la 25-an de septembro en halo
de Stadion.**

Je la 10:15 horo malfermas la prezidanto de la loka kongresa komitato *Hoffner* la kongreson kaj proponas jenan estraron de la kongreso: prezidantoj *Dr. Stan. Kamaryt*, *Ing. Gustav Scholze*, sekretarioj *Josef Vondroušek*, *Rich. Chlup*, protokolistoj *Fr. Heikenwälder*, *Ant. Veselý*. La propono estis ĉiesvoĉe akceptita.

Prez. Kamaryt en nomo de la elektita estraro dankas pro honoriga fido de la kongreso kaj la estraranoj akceptas la gvidon de la kunsidoj.

La prezidanto *salutas* ĉeĥlingve registaran konsiliston *Karel Rotter*, kiun delegis por la kongreso la *landa ofico (Zemský úřad)* en *Brno*, kaj dankas pro tiu honorigo. Konsilisto *Rotter* sekvis la inviton kaj sidiĝis sur estrado. Poste salutis prez. Kamaryt kortegan konsiliston *Hugo Steiner*, prezidanton de *Aŭstria E-Asocio* kaj *UEA-estraranon*, kiu venis el *Wien* por saluti la kongreson en nomo de *UEA*. *Steiner* alparolis la kongreson kaj al sia saluto aldonis inviton al la universala kongreso okazonta en *Wien* 1936.

Sekvas *salutoj* de reprezentantoj de *esperantistaj organizajoj*:

Por *E. Klubo* en *Brno* prez. *Hoffner*: Estas nia plej sopira deziro, ke en nia urbo, kiu estas historie signifa por la movado, elkresku el laboroj de la kongreso kontentiga solvo de unueciga problemo. Unuigita organizo estas necesa antaŭ ĉio, por ke ni gajnu pli grandan influon kaj respekton antaŭ oficialaj aŭtoritatoj de nia ŝtato. Sed ĝi estas ankaŭ manifesto de forta volo al la internacia kunlaborado, kiu helpas trankvilan evoluon de interrilatoj de niaj nacioj. Unuecigo signifas ankaŭ grandan subtenon de interrilatoj kun fremdlando, kiuj fariĝados helpe de la unueciga organizo ĉiam pli facilaj kaj pli elastaj. Hodiaŭ volas ni esperantistoj, kiuj silente kaj neatentate povis krei en niaj rondoj atmosferon vere internacian, voki en la mondon, ke ĉiuj homoj posedantaj la samajn racion kaj sentokapablon kuniĝu por batali por la fundamentaj homaj rajtoj. Ni, esperantistaro de unusola demokratia ŝtato en centra Eŭ-

ropo, levas hodiaŭ la standardon de praktike efektiva igata pacifismo kaj internacia frateco kaj egalrajteco.

En nomo de „Teatro kaj Radio-Aktoroj“ *J. V. Šamla*.

En nomo de „Tutmonda Asocio de Geinstruistoj“ *T. Kilián*.

En nomo de „Societo de ĉeĥoslovakaj nevidantaj esp-istoj“ *Krchňa*.

Salutleteroj, (legitaj de sekretario *Vondroušek*) venis de:

Estraro de ministraro (senkulpigo). *Ministerioj: eksterlanda* („ŝatas signifon de la kongreso, ne povas pro argumentoj buĝetaj sendi reprezentanton“), *lern-eja* („Ĉar ĝi pro alimaniere okupiĝo ne povas sendi reprezentanton, kiu partoprenus la kongreson, la ministerio petas pri afabla sendo de kopio de la kongresa protokolo, eventuale de rezolucioj, kiuj rilatus la aferojn de la ministerio“), *komerca* („Ministerio kun intereso observas precipe klopodojn de ĉs. esp-istoj en kultura kaj ekonomia, precipe porfremdula propagando de Ĉeĥoslovakio en fremdlando kaj ĝi estas al Vi danko pro afabla raporto pri rezultoj de la kongreso“). *Urbestro de Brno*, akceptinta protektorecon. *Centra societo de instruistaj unuigoj en lando Moraviasilezia — Ústřední spolek jednot učitelských v zemi Moravskoslezské* („Ni deziras al Via agado multan sukceson, ankaŭ al Via klopodado por internacia alproksimiĝo kaj interkompreniĝo. Instruistaro ĉiam subtenas tiajn tendencojn, kiel ligas nin por tio testamento de nia ĉefinstruisto *J. A. Komencký*“). *Ĉs. centro de fremdula turismo — Československé ústředí cizineckého ruchu*. *Landa porfremdula asocio de Moravio kaj Silezio — Zemský cizinecký svaz pro Moravu a Slezsko* (sendis delegiton konsil. *Jos. Barvíř*).

Naciaj societoj bulgara, franca, germana, norvega, rumana. Redakcioj de Literatura mondo kaj de Pola esperantisto. Societo Danubio (*Wien*). Redakcio de Progreso. Regiona Esperantista Ligo (Ĉ. Těšín), E-klubo en Bratislava, Ĉeské Budějovice (Progreso), Hradec Králové, Jaroměř, Kutná Hora, Orlová, Přerov, Tetschen-Bodenbach.

Samideanoj *Bartošík*, *Borovka*, *Böhm*, *Dejmek*, *Ginz*, *Göbelt*, *Hromada*, *Klinger*, *Krysta*, *Páv*, *Růžička*, *Slaný*, *Šavel*, *Šupichová*.

En nomo de la estraro kongresa proponas prez. Kamaryt sendi saluttelegramon al prezidento Masaryk. Ĝi estas aprobata kun granda aplaŭdo. La prez. informas, ke telegramo sendita de kongreso olomouca estis konfirmita kun danko de la prezidenta kabineto.

Sekvis *parolado* de T. Kilián: „Ĉu estas esperanto nura lingvo?“ (La teksto aperos en „Ligilo“.)

Prez. Kamaryt proponas por la kongresa agado jenan programon: Estos legitaj proponataj tekstoj de rezolucioj al publikaj aŭtoritatuloj. La rezolucioj estis finredaktitaj en kunveno de ĉeestantaj ĈAE-, GEL- kaj LKK-anoj okazinta hieraŭ, kiun partoprenis Berka, Hofner, Friedrich, Heikenwälder, Chlup, Kilián, Kamaryt, Šamla, Šustr, Veselý, Vondroušek. La kongresanoj pridiskutu ilin post la kunvenoj kaj proponu al la estraro kompletigojn aŭ ŝanĝojn. En la ferma kunveno oni ilin pridiskutos kaj akceptos. Poste ni tuj komencu agadon pri la programo, kiu estis dissendita la 10-an de septembro al la kluboj kaj publikigita en „Ligilo“. La kongreso akceptas tiun programon,

La rezolucioj estis legitaj de la prezidanto.

Poste venis tuj punktoj de la programo laŭ jena sekvo.

1. Radlo.

Venis en la kunvenon Dalibor Chalupa, ĉefo de la Literatura sekcio de Radio-journal en Brno. Li salutis ĉeĥlingve la kongreson en nomo de la sendstacio Brno kaj informis, ke la stacio de Brno disaŭdigadis dum la lastaj du jaroj aron de programoj kaj prelegoj en espo kaj estas tre kontenta pri ilia resonado en fremdlando. Li estos danko al la kunveno, se li aŭdos, por raportu al la Radio-journalo, proponojn pri plibonigo kaj por novaj aranĝoj de esp-programoj.

Sekvis vigla diskuto ĉeĥlingva, en kiu estis dirite kaj legite el venintaj leteroj: La espo-programojn relajsu ĉiuj ĉs. stacioj, precipe ankaŭ Bratislava kaj Praha I., por ke ankaŭ posedantoj de malkaraj aparatoj povu aŭskulti ilin (Sadecký, Göbelt). Bratislava povas tre malfacile relajsi programon post 22^h15, ĉar post la lastaj informoj de Ĉs. presa servo (ČTK) sekvas en Bratislava ĉiam la hungarlingvaj informoj de la Presa servo (Chalupa, Kamaryt). La espo-programoj estu pli frue (Krysta, Kotoulek, Vaněk). Sed por fremdlandaj aŭskultantoj nia horo, post la 22-a, estas tre taŭga, estus danĝere riski la horon jam kutiman por multaj (Chalupa, Chudoba, Kamaryt). Tiom klara kiom espo estas neniu alia lingvo; tial oni devus uzi ĝin regule por anonci almenaŭ la plej gravajn programojn nacilingvaj (Friedrich). Oni aŭdis kaj legis de multaj blinduloj, ke ili kun granda ĝuo aŭskultis „La venditan fianĉinon“. Ankaŭ la operetoj estis kun granda ĝuo aŭskultataj. Bona muziko estas multe pli bona propagando por la ŝtato ol ia ajn parolado (Krchňa, blindulo). Pure propagandajn programojn nia stacio ne enmetas kaj ne

enmetos multajn. Sed ni intencas nun pli ofte propagandi niajn demokratiajn konstitucion, administron kaj aliajn aranĝojn. Ni preparas disaŭdigon de opero Rusalka kaj radio-filmon ĈSR laboranta kaj ni volas fari eksperimenton kun melodramo (Chalupa). Tiuj promesoj trovis spontanegan aprobon de la kunveno. Sed Valoušek havas dubojn pri sukceso de melodramo. La esperanta teksto de „La vendita fianĉino“ estu eldonita presite (Vavrovský). La radio disaŭdigu la informojn pri entreprenoj de Espo-kluboj (Šlapita). Pri tio ni havas normon, ke ni disaŭdigas sole informojn de la centraj asocioj, ne de la lokaj societoj. Tial ni ekz. disaŭdigis pri la kongreso, ni disaŭdigas la informojn de ĈAE, sed ni ne povas disaŭdigi entreprenojn de lokaj grupoj (Chalupa). Radio-journal meritas multan dankon de ni (Philadelphia). La informoj pri espo-disaŭdigoj estu donataj ankaŭ en la braile skribita preso (Bloch). En la porlerneja disaŭdigo estu unu-minutaj sciigoj, kie estas espo instruata en lernejo, por ke estu ebla kontakto de la lernantoj (Neužil).

Chalupa en nomo de la Radio-journal dankas pro la serioza intereso de esperantistoj pri la espo-disaŭdigoj. Prez. Kamaryt dankas s-on Chalupa pro la donitaj informoj kaj lia sindonemo al uzo de espo por radio-disaŭdigoj kaj direkcion de la Radio-journal precipe de stacio Brno pro ilia ĝusta kompreno de rolo de espo en radio.

Transprenas prezidaton Scholze. La raportado kaj diskutado rez okazas esperantlingve.

2. Lernejoj aferoj.

Kamaryt raportas pri la perdo de pozicioj en publikaj lernejoj. Nova instruplano de komercaj akademioj malhavas espon kiel laŭvolan fakon. Nova Ekzamena regularo por instruistoj de burĝaj lernejoj validonta depostlernejaro 1936/7 malhavas espon kiel ekzamenfakon. Kulpaj estas ne sole la lerneja administracio, sed ankaŭ ni espistoj mem. Ni ne uzas eĉ ne provas almenaŭ uzi la ekzistantajn permesojn instrui en publikaj lernejoj. Komprenoble la plenumo de formalajoj estas teda laboro, sed ĝi estas nepre necesa ĉu por ricevi permeson oficiale instrui en publika lernejo, ĉu por akiri la rajton plendi publike pro nedono de la permeso. Precipe bedaŭrinda estas la fakto, ke multaj aprobataj instruistoj ne nur neniam instruis, sed eĉ neniam provis instrui. Institucio de publikjuraj ekzamenoj estas tre grava, kaj ne estis por ni facile atingi ĝin. Tial ni rajtis atendi, ke la samideanoj uzos kun multe pli granda fervoro la eblecojn donitajn. Temas precipe pri instruistoj kaj profesoroj aŭ pri posedantoj de maturec-ekzameno aŭ pli altaj lernejoj diplomoj. Por la ceteraj estas la ekzameno relative malfacila, ĉar ili estas krom espo ekzamenataj el nacia lingvo, pedagogio kaj ĝenerala klereco. Tial meritas apartan dankon de la movado tiuj samideanoj, kiuj lasis sin ekzameni kaj precipe tiuj, kiuj oficiale instruis en

publikaj lernejoj vicon de sinsekvaj jaroj, plenumante ĉiujn necesajn formalaĵojn kiel prof. Smeták, Jukl, Scholze, instr. Neužil kaj aliaj.

Sekvis longa debato, kiu daŭrigis ankoraŭ en la unua laborkunveno. Por redoni ĝian enhavon pli efike, ni resumas ĝin sub unu titolo (aldonante ankaŭ la ideojn esprimitajn perletere).

Estas certe utile per rezolucioj kaj memorandumoj sciigi al ministerio niajn postulojn. Sed ni ne forgesu, ke pro malantaŭen paŝo de nia pozicio estas kulpa la esperantistaro mem. Tial nepre ni devas alvoki nian samideanaron persisti, denove klopodi kaj precipe instrui en lernejoj oficiale (Scholze, Hromada, Krysta). La ekzamenantoj ĉe ŝtataj komisioj estu dece severaj, por ke diplomon akiru ekskluzive kapablaj homoj (Scholze, Kamaryt, Hromada, Heikenwälder). Sed tiu ĉi postulo ne ĉiam estas facile efektivebla. Oni ne povas ĉiam malatenti la vidmanieron de organizanto; la sperto montras, ke ne ĉiam fervora propagandanto estas funde informita pri la literaturo, pri detaloj de gramatika kaj vortara strukturo de la lingvo; ekzistas fervoraj propagandantoj, kiuj neniam dediĉis sian tempon al pli funda studo de gramatiko de sia gepatra lingvo (Kamaryt). La permesoj instrui oficiale en duagradaj lernejoj estas nun donataj nekompleze (Kamaryt, Krajc). Plej facile estas solvebla la afero, se oni ricevas personan permeson instrui oficiale. Tian mi ricevis de sekcia ĉefo en lerneja ministerio kaj depost tiu tempo mi instruas en germana supera industria lernejo en Reichenberg oficiale, kiel nedevigan fakon, kun bona sukceso. Tian permeson oni ricevas, se oni estas en bone rilato kun la ĉefo kaj se oni rezignas pri pago (Scholze). Sen pago mi, estante instruisto, povas ja instrui en mia lernejo, neniun petante pri permeso (Jeřábek). Tio ne estas nia intenco, nek ĝi estas solvo de nia deziro. Ni nepre volas, ke instruado en lernejoj okazu „oficiale“, tio signifas laŭ la leĝaj normoj, ke ĝi estu enskribita en la katalogoj kaj ke estu noto sur atestoj (Scholze, Kamaryt). Mi instruas sen honorario en la popola lernejo en Neředín, kie mi estas lernejestro, depost la j. 1919, ĉiun jaron 1—2 horojn semajne, kun tre bona sukceso. Venas en la lernejon multaj vizitantoj enlandaj kaj eksterlandaj kaj ĉiuj estas surprizitaj pro bonaj rezultoj. Tre bona sukceso estis antaŭ jaroj dum mia ekskurso kun infanoj en Dresden. La infanoj, lernintaj ĉe mi espon, bone studas en meza lernejo. Ĉiu, kiu volas instrui laŭ mia metodo, petu broŝuron de mi verkitan, mi volonte sendos ĝin (Neužil). Ni devas kontakti kun gepatroj de niaj lernantoj kaj ilin konvinki pri utileco, ke oni instruas espon al iliaj infanoj (Neužil). Plej taŭge estus instrui espon en la kvara jaro de la burĝa lernejo apud la franca (Kilián). Ni klopodu, ke Ruĝa Kruco organizu instruadon de espo al soldatoj (Chmelařová, Krumpholz). Ĝi estos versimile vana

klopodado, soldat-komandantoj ne ŝatas tiajn aranĝojn (Kilián). Ni ne forgesu, ke ekzistas rezolucio de la 10-a int. konferenco de Ruĝaj Krucoj el 1920 por espo. Ke Bulteno de Ruĝkruca Junularo en 1921 publikigis artikolon de Kamaryt por espo kaj Slici eĉko 1932/3 kompletan kurson de Dolinský (Kamaryt). Jes, ni turnu nin persiste al Ruĝkruca Junularo (Neužil). Landa lerneja konsilantaro en Brno tre malvolonte procedis pri propono nomigi ekzamenan komisaron en Moravská Ostrava (Krajc). Por faciligi la ekzamenon al kandidatoj oni aranĝu kursojn por kandidatoj de ŝtataj ekzamenoj (Krajc). Certe estas tiaj kursoj aranĝo utila. Estis plurfoje organizitaj, precipe en Praha, la plej lasta de Instituto (Kamaryt). Kiamaniere devigi la Popolan altlernejon en Olomouc, ke ĝi enmetu inter la lingvaj kursojn ankaŭ espon? (Blažek). Certe suliĉas persistaj personaj intervenoj. Multaj similaj institucioj regule aŭ ofte havas aŭ havis espon inter siaj lingvokursoj, ekz. en Bratislava, Reichenberg, Brno, Plzeň. Bedaŭrinda sperto estas, ke venas nulaj aŭ tre malmultaj aliĝoj (Kamaryt, Scholze, Čiperová). Ni nepre zorgu, ke ankaŭ en publikaj kursoj estu bonaj instruistoj, plej bone ekzamenitaj. Ofte nesukceson de la kurso kulpas la malbona instruanto (Scholze). Estas tre utile atentigi interesantojn pri la kursoj por instruistoj (Pontz). Donu sur afiŝojn, ke en la kurso instruos diplomita espo-instruisto (Jelínková). GEL faras liston de ŝtate ekzamenitaj instruistoj, strekas el ĝi tiujn, pri kiuj ĝi scias, ke ili jam forgesis siajn sciojn aŭ perdis sian intereson. La rezultinta listo estos tamen tre utila, malgraŭ sia nelongeco (Scholze). Tion jam faris ĈAE antaŭ du jaroj. La listo estas efektive mallonga. Kelkaj spertoj estis eĉ dolorigaj. Ni spertis de unu ŝtate ekzamenita instruisto malĝentilajn ofendan (Kamaryt). Por akiri rezultojn pli daŭrajn, la baza kondiĉo ŝajnas esti interŝtata akordo laŭ ideo de Privat. Nia Asocio tre laboris por ebligi ĝin. Bedaŭrinde ne ĉiuj ceteraj naciaj asocioj estas jam nun kapablaj kunlabori (Kamaryt, Krysta). Nepra tasko ankaŭ en la lerneja afero estas venki la malfacilaĵojn kaj klopodi por reakiri la postenojn perditajn kaj akiri novajn (Scholze, Kamaryt).

La malferma kunveno estis finita per kanto de la himno „En la mondon“ je 12:20 h.

Unua laborkunveno

sabaton 28-an de sept. en Osvětový dům.

La prezidanto malfermas la kunvenon je 14:30 h

Esprimas salutojn ĉeestantaj anoj de la lokaj grupoj: Uherské Hradiště (Vilémová), Radvanice (Křetinský), Ĉes. Těšín (en nomo de REL Ponca varme rekomendas unuecigon), Olomouc (Neužil en nomo de siaj lernantoj), Kunovice (Philadelphia: Ni devas ĉion oferi por nia idealo), Plzeň (Čiperová en nomo de la Homama asocio), Prostějov (Heikenwälder en

nomo de Ligilo), Košice (Friedrich atentigas, ke en ilia klubo amike kunlaboras kvin nacioj), Hluk (Omelka), Přerov (Chmelařová), Mor. Ostrava (Krajc), Brno (Chlup en nomo de loka grupo de GEL), Znojmo (Hochan en nomo de katolikoj), Mladá Boleslav (Šolc), Olomouc (Neužil por loka grupo), Dolní Bousov (Vaněk), Svitava (Karger), Lázně Bělohrad (Beran), Praha (Šustr, E.-Klubo), Nové Zámky (Kotoulek), Gablonz (Pontz), Lučenec (Uhliar), Žďár (Šustáčeková), Holešov (Konečná), Lubná (Večeře). Finis la vicon de salutoj prez. Kamaryt en nomo de Klubo de Bratislava.

Estrarano de UEA Steiner donas detalajn klarigojn pri la univ. kongreso en Wien 1936. Li rekomendas aŭskultadi kaj konfirmadi la esperanto-prelegojn de la Wiener stacio, kiuj estos nun ĉiun merkredon je la 18:35 h.

3. Unuecigo enlanda.

Prezidanto de la porstatuta komisiono Friedrich resumas la agadon, pri kiu li raportis jam en la ĝenerala kunveno de ĈAE. Tiu raporto estas resumita en la Bulteno p. 23. Kvankam la delegitoj de GEL demetis siajn funkciojn en la komisiono, la komisiono daŭrigis siajn laborojn. Post rezigninta komisionano Sklenčka estis de ĈAE delegita Ginz. La komisiono preparis la statuton, atentante ĉiujn venintajn sugestojn tiel, ke la nova statuto ebligis partoprenon en la neŭtrala nacia centro al ĉiuj esperantistoj de la respubliko. Do ankaŭ al REL, ARE kaj al ĉiuj fakaj organizoj. Ili povos esti aŭtonomaj fakoj. La statuto ebligas tute aŭtonoman propagandan laboron en koncerna nacilingva sfero al ĉiuj nacioj de nia ŝtato. La avantaĝoj de unusola centro estas tiom evidentaj, ke ĉiu klarigado aŭ argumentado aspektas superflua. Certe multe pli impona estos unusola centro kun du mil membroj ol tri—kvar po kelkaj centoj eĉ dekoj. Nupartoprenon de GEL ni tre bedaŭras, sed ni fondos la novan centron titolitan „*Esperanto-Asocio de Ĉeĥoslovaka Respubliko*“ (EAĈSR) ankaŭ sen ĝi, ĉar ni ricevis jam multajn aprobojn de germanoj kaj pluajn ni certe ankoraŭ ricevos.

Hoffner demandas delegitojn de GEL, kial ili ne volas partopreni la unuecigon.

Scholze: Ni ne povas decidi tie ĉi libervole, ĉar ni ne havas rajtigojn de GEL. La lasta ĝen. kunveno ne estis por la unuecigo.

Pontz: Ĝenerala kunveno de GEL versimile ne havis intereson por la organiza demando. Ambaŭ asocioj povas marŝi mano en mano. Ankaŭ GEL estas tutŝtata asocio.

Friedrich: Tiel estas la ŝtato ankoraŭ pli malbona, pli komplika, se la ambaŭ asocioj volas labori en la sama medio.

Pontz: Ĉelkampo por GEL estas kompreneble la germana lingva sfero. Laŭ la kolonia kontrakto ni

devis ja ŝanĝi nian statuton, por ke ni estu neŭtrala organizaĵo.

Sonnenfeld: Kian avantaĝon vidas GEL en tio, ke ĝi restas sola?

Donner: Mi estas germano, sed mi estas tre por unusola komuna neŭtrala asocio propaganda.

Kilián: Ĉar GEL akceptas ankaŭ ĉeĥoslovakojn, ni ja povus organizi amasajn aliĝojn de niaj partianoj al GEL kaj poste en la ĝenerala kunveno per plimulto baloti por likvido de GEL. Sed tiun procedon ni neniam uzos, nek proponos. Ni rigardas kiel demokratia metodo provi per ĉiaj eblaj rimedoj konvinki vin.

Höflert: Mi estas germano kaj estas kontraŭ vidmaniero de GEL-komitatoj. En nomo de germanaj espistoj en Znaim mi estas por la komuna centro.

Kamaryt: La debato sufiĉe klarigis la diversajn vidmanierojn. Ĉiuj interesatoj certe legis la detalajn informojn en Bulteno de ĈAE kaj Informilo de GEL. Nun ni jam finas la diskutadon. Ankaŭ en leteroj senditaj al la kongreso estas varmaj pledoj por unuecigo, precipe de Krysta, Slaný, klubo Jaroměř, Borovka, EMO en Orlová. La statuto de la nova EAĈSR estas jam finredaktita, ĝi estas verko relative tre bona. Ĝi jam estas aprobata de la ministerio. La Porstatuta komisiono decidis kunvenigi la fandan ĝeneralan kunvenon kaj inviti al ĝi ĉiujn esperantistojn en la respubliko per cirkuleroj al la kluboj kaj en la Bulteno de ĈAE. La fonda kunveno okazos en la sama ejo post duonhoro. La laborkunsido de la kongreso finiĝas.

* * *

Fonda ĝenerala kunveno de Esperanto-Asocio de Ĉeĥoslovaka respubliko.

En Brno, en Osvětový dům. 28. IX. 1935, je la 17-a horo.

Prezidas: Jozef Friedrich, fervoja konsilisto (Košice); *protokolos*: Fr. Heikenwälder, librotenisto (Prostějov) kaj Jar. Šustr, komercisto (Praha). Ĉeestas anoj laŭ la listo de ĉeestantoj.

Prezidanto malfermas la kunvenon.

Dr. Stan. Kamaryt, profesoro (Bratislava) legas la statuton aprobitan de ministerio de interno per dekreto n-ro 52.003/1935 (2a) el 26. VIII. 35.

La prezidanto demandas, ĉu la kunveno konsentas fondi tiun societeton.

La kunveno konsentas ĉiesvoĉe.

La prezidanto proponas elekton de komitatoj. Por ke la ĉeestantoj povu interkonsiliĝi pri la kandidatoj, li faras paŭzon en la kunveno.

Dum la paŭzo kunvenis diversaj proponoj. Post la interkonsento pri la kandidatoj la prezidanto malfermas la kunvenon kaj proponas al balotado jenajn kandidatojn:

Komitatoj: Dr. Stan. Kamaryt (Bratislava), Otto Ginz (Praha), Jozef Friedrich (Košice), Jaroslav Šustr (Praha), Frant. Heikenwälder (Prostějov), Josef Von-

droušek (Brno), Mr. Franz Höflert (Znaim), Josef Karl Donner (Plan), Lud. Krysta (Ĉes. Těšín), Teodor Kilián (Třebíč), Růžena Vilémová (Uherské Hradiště), Robert Bloch (Praha).

Vickomitatoj: Mir. Staněk (Praha), Anna Tarantšková (Praha), Fr. Buhr (Praha), Josef Poncza (Ĉes. Těšín), Josef Kožený (Ml. Boleslav), Jan Janda (Kolín).

Kontrola komisiono: J. V. Šamla (Brno), J. V. Dolinský (Turč. Sv. Martin), Leoš Feigenblatt (Kyjov), membroj. Ant. Veselý (Prostějov), Ing. Lad. Krajc (Mor. Ostrava), vicmembroj.

Oni balotis pri ĉiu aparte laŭ la supra sinsekvo kaj ĉiuj kandidatoj estis elektitaj ĉiesvoĉe.

Kamaryt legas tekston de *Regularo de la Sekcioj*, redaktitan de la Porstatuta komisiono kaj proponas ĝian aprobon. La regularo estas ĉiesvoĉe aprobita.

Kamaryt proponas, ke la nova asocio eklunkciu deponit 1-a januaro 1636. Aprobita ĉiesvoĉe.

Kotizoj: Kč 16.- por ano senpera, Kč 12.- korporacia. Prezidanto fermas la kunvenon kun deziro de sukcesa laboro. Aplaudoj. Fino je la 19-a horo.

* * *

Dua laborkunveno

dĵmanĉon 29-an de sept. en Osvĕt. dŭm.

La prezidanto mallermas la kunvenon je 8:30 h. por la lastaj du programpunktoj:

4. Komerco kaj esperanto.

Propono de Sonnenfeld pri fonda de Komerca societo, kiu uzos eson por servo de ne-espistoj. La aŭtoro klarigis sian projekton. Post nelonga diskuto estis decidite, ke la kongreso komisiu specialan komisionon por studi la projekton detale kaj trovi vojojn por efektivigo. Ĝi raportu al la EAĈSR. La komisiono ĉiesvoĉe elektita estas: Sonnenfeld, Jeřlnková, Scholze, Vondroušek, Šamla, Strejčková. La komisiono havas rajton aligi pluajn anojn.

Internacia komerca adresaro. Hromada sendis la proponon, ke la kongreso rekomendu al UEA repreni lian sistemon faritan proponon pri eldono de adresaro de firmaoj kapablaj korespondi en espo. Nuna krizo de komerco kun eksterlando kulminas, ĝi ekĉesados. Kamaryt informas, ke li jam kiel estrarano de UEA faris en tiu ĉi jaro tiun proponon al UEA-estraro. Traktado pri ĝi ankoraŭ ne komencis. Li rekomendas proponon de Hromada. Scholze havas dubojn pri efektivebleco. Post nelonga diskuto estas la propono akceptita. En sia letero Hromada ankaŭ rekomendas akcenti gravecon, ke almenaŭ oficistoj-espistoj sciuj terminojn komercajn kaj korespondajn. Por tiu studo bone servos kiel unua informilo la *E-a korespondanto de Šupichová*, kiu meritas la plej grandan atenton.

Eldoni ĉeĥlingvan informilon pri uzo de espo por eksport-komercistoj rekomendas letere klubo de Jaroměř.

5. Turismo kaj esperanto.

Venis en la kongresa korespondado multaj sugestoj pri tiu temo, precipe detalaj en leteroj de Ginz kaj Hromada.

Eldono de esperant-lingva varba materialo turisma estas ĉiam elika. Sed por ke ĝi estu plene uzita, estas nepre necese, ke la materialo ne restu ĉe la eldoninto, sed atingu la uzontojn (Hromada). La materialo devas aperi ĝustatempe kaj esti taŭgatempe dissendata. Preparojn por somero oni devas fari jam dum la vintro. Alimaniere oni elspezas la monon vane. Tre bona sukceso estis eldono de esperant-lingva broŝuro pri S-a Venceslao-ĵestoj en j. 1929. Ĝi aperis en du eldonoj, ĉiuj ekzempleroj estis baldaŭ elĉerpitaj. Sed nepre estas bezone, ke estu taŭgaj homoj sur taŭgaj lokoj. Ni espistoj ne povas toleri, ke netaŭgaj homoj estu sur grava posteno (Bloch). Ministerio fervoja devus anonci al ĈAE ĉiun sian esperant-lingvan eldonaĵon, por ke ni povu ĝustatempe diskonigi la aperon. Sed nia samlandanoj memoru, ke tiuj eldonaĵoj estas destinitaj por la fremdlando. Do ili ne kolektu ilin! Ĉeĥoslovakianoj ne mendu la materialon, escepte se ili volas kaj povas sendi ĝin al taŭgaj adresoj en fremdlando (Ginz). UEA-centra oficejo aldonas al siaj cirkuleroj por estraranoj la gvidfoliojn esperant-lingvajn, kiujn ĝi ricevis en 10 ekz. Estas grave, ke neniu eldoninto forgesu sendi Ĝinevon tiun dekon da ekz. Ĝi signifas efektive tre elikan diskonigon de la eldonaĵo. Ni povas sendi Ĝinevon kompreneble sole tiujn eldonaĵojn, kiujn ni por tiu celo ricevis (Kamaryt). Mendu esperantlingvan materialon turistan eldonitan en fremdlando. Se vi ricevis ĝin, ne forgesu konfirmi la ricevon, kaj se vi efektive uzis ĝin, informu pri tio la eldoninton (Kamaryt). Ni atentigu koncernajn instancojn pri uzo de espo en Aŭstria turisma propagando, precipe nun, kiam oni tre plendas pro nekontentiga rezultato de nia propagando turisma en pasinta sezono vojaĝa (Hromada). Tion jam parte nia Asocio faris, sendinte du bele dokumentitajn informajn leterojn, verkitajn de Ginz, al ministerio fervoja (Kamaryt).

Turisma filmo. Estas necese prepari varban turisman filmon kun esperant-lingva teksto anstataŭ la elmodiĝintaj diapozitivaj. Precipe rekomendinda estas la tiel nomita diafilmo. Hungaroj sendas tiajn diafilmojn senpage al ĉiu, kiu promesas uzi ilin por prelego aŭ ekspoziciado. Jam venis al ni peto el Breslao pri diafilmoj similaj al Hungaraj (Ginz). Ni proponu fabrikigon kaj disponigon de lia filmo al Baťa (Blažek). Antaŭ nelonge provis Šupichová trakti kun Baťa por interesigi la firmaon pri espo. Ĝi riluzis klare (Kamaryt).

Afiŝoj. Ministerio fervoja eldonu krom gvidlibrojn ankaŭ afiŝojn kun esperant-lingva teksto. Pri tiaj afiŝoj ni povus garantii, ke ili pendos en fremdlando sur tre taŭgaj lokoj (Ginz).

Vizitoj de vojaĝantaj espistoj el fremdlando estas en niaj regionoj relative tre multaj. Tiun ĉi someron estis ekz. nia oficisto Šavel ofte tre okupita per zorgo pri fremdaj gastoj. Iam sen li tia servo eĉ ne estus estinte ebla (Ginz). Kompreneble tia servo al fremdaj espistoj devas esti precize kaj serioze plenumata. Okazis, ke privata persono invitis Prahajn fremdlandajn espistojn, kiuj restis poste en Praha sen ia ajn zorgo, ĉar la invitinto estis forvojaĝinta kaj nenium informis pri la venontaj fremduloj. Tre sukcesa estis en la lasta tempo karavano de estoj veninta aŭtobuse. Pri ĝi estos detala raporto en la Bultena kroniko. Ili estis tre kontentaj kaj promesis viziti respublikon ankaŭ venontjare (Ginz). Grave estas, ke ni estu en daŭra kontakto kun turisma organizo, precipe tiu duonoficiala. En Gablonz tio estas larata tre laŭplane kaj persiste. Por daŭra sukceso estas bezona disciplino de niaj anoj, sindediĉo al tia laboro. La Gablonza klubo organizis edukon de siaj anoj por fremdulgvilado (Pontz). Estas bezone kapti ĉiun okazon por venigi fremdlandanojn en niajn regionojn. La nombro de tiaj vizitoj estas relative granda. Sed por ke ĝi estu impona, estus bezona statistiko pri vizitoj instigitaj de presperantista propagando. Ni klopodu fari ĝin. Dediĉu nin serioze al turismaj taskoj (Šustr). Grava estas persona propagando kaj rekomendo de unuopuloj (Jelínková). Ni kreu ĉe la Asocio specialan komisionon turisman (Heikenwälder). Zorgu ni, ke okaze de la Wiena kongreso estu ĉe ni organizitaj antaŭ- kaj postkongresoj (Hromada, Rosa).

Por plibonigi nian servon al vojaĝantaj fremdlandanoj ni nepre bezonus oficejon en Praha, facile trovblan. Estus devo de koncernaj institucioj por fremdul-trafficilo disponigi al ni tian taŭgan ejon. Ni turnas nin al institucioj ŝtataj, urbaj kaj porfremdulaj, ke ili helpu al ni en tiu ĉi grava bezono (Ginz).

Somerrestadejo en L. Bělohrad. La Klubo en L. B. donis perletere al la kongreso informon kaj alvokon pri tiu ĉi grava espista entrepreno: En 1931 fondis tiama ĈD Sklenčka kun niaj anoj Blumauer kaj Pech sub protekto de la loka grupo de Klubo de ĉs. turistoj „Unuan Esperantistan somerrestadejon en L. Bělohrad“, kiun ankaŭ tre favoris UEA. Ĉar printempon 1931 estis en L. B. sole du espistoj, oni aranĝis kurson por komencantoj, kiun partoprenis 15 p., gv. de Blumauer. La preparajn laborojn faris Sklenčka. Li eldonis esp-lingvan broŝuron, dissendis ĝin al ĉiuj UEA-delegitoj kaj en somero li kaj lia edzino gvidis la somerrestadejon. Ĉar tiam ankoraŭ ne estis la limoj interŝtataj fermitaj per diversaj devisaj aranĝoj, kiel estas nuntempe, estis la rezulto tre kontentiga. Venis 70 espistoj el 14 landoj. Inter ili direktoro Jakob, vicprez. de UEA Karsch, Dr. Domec el franca Hindo-Hinujo. En 1932 ne estis la somerrestadejo aranĝita. En 1933 estis en printempo nova kurso kun 30 p. gvidita de fervora samidean-

ino Mašfnová. La loĝantaro vidinte la brilan sukceson de la unua somerrestadejo, interesiĝis pli multe pri espo kaj la urbestro tre favoris nian agadon. La dua libertempejo estis preparita kun nova entuziasmo, denove estis eldonitaj broŝuroj kaj dissenditaj en la tutan mondon. La duan somerrestadejon sukcesplene gvidis Strejčková kaj Šamla el Brno. Alvenis '76 espistaj vizitintoj el 8 landoj. Aŭtunon 1933 venis s-ano Fasce, itala cseh-instruisto, por „pasigi ĉe ni sole kelkajn tagojn“. Sed kiam li aŭdis pri la granda intereso de loĝantaro kaj niaj s-anoj promesis al li ĉion necesan prizorgi, li tuj promesis aranĝi cseh-metodan kurson. Tiu ĉi havis grandan sukceson (40 kursanoj), s-ro Fasce aranĝis ankoraŭ kurson por progresintoj kaj duan kurson por komencantoj. Li restis inter ni 5 monatojn kaj por ni eĉ por li tiu tempo estas neforges-ebla. En la j. 1934 estis eldonita nova faldprospekto pri Lázně Bělohrad kaj denove dissendita, sed la malbonaj ekonomiaj cirkonstancoj malebligis en ĉiuj landoj vojaĝadon fremdlanden kaj pro tio ankaŭ la vizito estis nur malmultnombra. Venis 47 samideanoj el 7 landoj. La samaj cirkonstancoj kaŭzis malgrandan viziton ankaŭ en la 1935. — Sed la kaŭzo ne estis nur en malbona situacio internacia. Iomete kulpas ankaŭ niaj ĉeĥoslovakaj s-anoj, kiuj ĉiujare legadas en enlandaj kaj fremdlandaj espogazetoj pri la „Verda banejo“ kaj tamen nur malmultaj vizitis nin. Mi devas bedaŭri, ke nia penado estis ĝis nun preskaŭ vana, sed mi esperas, ke estraroj de ĈAE kaj GEL subtenos nian entreprenon morale kaj rekomendos al siaj anoj viziton de Internacia somerrestadejo. En Lázně Bělohrad estas 80 personoj parolantaj esperanton kaj ne ĉiuj eklernis esp-on pro la interna ideo, estas ankaŭ, kaj mi povas diri plimultaj, tiuj, kiuj traktas espon nur el la vidpunkto praktika kaj estus domaĝe, se pro la malmultnombra vizito de s-anoj, ili perdus intereson por nia afero, ĉar oni jam scias, ke el tiuj iamaj esperantistoj fariĝas ofte malfavoruloj de nia movado, kiuj al ĉiu diradas, ke esperanto estas netaŭga kaj malutila. Mi invitas per tio ĉi ĉiujn ĉeestantojn kaj precipe komitatojn de ambaŭ landaj organizoj, veni inter nin kaj konvinkiĝi per siaj propraj okuloj, ke nia urbo estas tre ĉarma kaj niaj anoj scias gastigi ĉiujn, kiuj venos. En ĉiuj oficejoj (poŝto, fervojo, banejo, ŝparkaso), en vendejoj kaj privataj loĝejoj oni parolas esperante kaj vi havus okazon uzi nian lingvon ne nur en la kunveno, sed en la praktika konversacio, en la praktika vivo. Nia klubo elspezas ĉiujare pli multe ol 3.000.— Kč kaj ni dezirus, ke tiuj sufiĉe grandaj sumoj ne estu elspezitaj vane, ke la samideanaro subtenu nin kaj montru al nia urbestro, ke ĝia favoro al nia movado estas fruktodona, ke sonu en la nova aleo de Dro Zamenhof de li kreita esp-o parolata de multaj niaj gastoj.

Venu, Bělohrad invitas vin! (Beran.)

Universala kongreso en Ĉeĥoslovakio! Ŝustr rekomendas inviti U. K-on por unu el la proksimaj jaroj en Prahon. Estas en Praha multaj spertaj kaj laboremaj manoj, kiuj ĝin bone organizos. Heikenwälder konsentas kun tiu propono. En fremdlando li persone spertis, ke estus inter esperantistaro granda emo iri Ĉeĥoslovakion por kongreso. Kamaryt aldonas, ke ĈAE jam antaŭ du jaroj enskribigis ĉe UEA Prahon inter la urboj konsiderindaj koncerne kongreson. En la sekvinta nelonga diskuto oni proponis kiel taŭgan jaron 1938. La kunveno unuanime akceptis komisiĝi ĈAE, ke ĝi klopodu ricevi oficialan inviton al UEA de iu grava publikjura instanco.

Rezolucioj.

Prezidanto demandas, ĉu la kunveno volas aprobi la rezoluciojn legitajn en la mallorma kunveno aŭ ĉu iu volas proponon pri ŝanĝoj.

Bloch proponas, ke rezolucio al ministerio poŝta estu akompanata de pli detala argumentado, ke poŝta ministerio ricevu pli longan petskribon. Prez. Kamaryt proponas, ke la kunveno komisiu s-on Bloch verki la koncernan tekston kaj sendi ĝin al ĈAE por plua uzo. La propono estis sendiskute akceptita ĉiesvoĉe.

Poste estis ĉiesvoĉe akceptitaj tekstoj de la rezolucioj kaj ĈAE komisiita transdoni ilin al koncernaj adresoj.

Teksto de la rezolucioj en esperanta traduko estas:

Al ministerio de komerco:

Ministerion de komerco ni dankas pro intereso, kiun ĝi dediĉas al nia klopodado uzi kaj uzigi esperanton por turisma kaj komerca propagando en fremdlando. Ni konstatas kun kontenteco intereson pri la stacidomaj tabuloj, por kiuj donis al ni ministerio siatepe subvencion. Ni rekomendas uzi esperanton precipe en ministeria plurlingva Bulteno, sur afiŝoj kaj en aliaj publikaĵoj.

Uzo de esperanto por pligrandigi la fremdultrafikon estis diskutata en nia kongreso aparte. Ni volonte konstatas, ke kelkaj publikaj institucioj, precipe ministerio fervoja, uzas nun esperanton pli ofte. Ni rekomendas en tiu ĉi lako daŭran kontakton kun esperantista organizo, ĉar ekskluzive tiamaniere estas atingeble, ke sumo investita en esperantlingvan materialon estu uzita efektive laŭ ekonomiaj principoj kaj laŭcele. Spertoj montris, ke en ĝusta organizo estas rezultatoj nekompareble bonaj, komparante ilin kun malgrandeco de elspezoj. Ni atentigas el la lasta tempo pri bonaj spertoj akiritaj dum karavanoj de fervojistoj Rumanujon kaj Nederlandon, pri la granda resonado de esperantlingvaj publikaĵoj de ministerio fervoja, pri spertoj de internacia somerrestadejo en L. Bělohrad.

Al ministerio de fremdlandaj aferoj:

Ministerion de fremdlandaj aferoj ni atentigas pri propaganda laboro, kiun faras multaj el ni kaj niaj

organizaĵoj, informante fremdlandon pri nia nacio kaj ŝtato. Ni faras tiun laboron volonte kaj komplete. Sed ni ne povas silenti pri nia trompiĝo, ke ni ne ĉiam ricevas suliĉan apogon por nia laboro. Ni trovas ekz. netaŭga, ke Ĉeĥoslovakujo ne reprezentigis sin en la lasta universala kongreso en Roma, kvankam reprezentigo per oficisto legacia signifus nenium elspezon. Kontraŭe ni ĝoje konstatas idealan intereson, kiun ministerio iam vidigas koncerne niajn iniciatojn. El la lasta tempo ni danke konfirmas subvencion por la Ĉeĥoslovaka antologio, neatentante malgrandecon de la sumo. Ni dankas ministerion pro tiu ĉi kompreno de nia penado kaj ni petas, ke ministerio kunlaboron kun ni konservu kaj pliprofundigu.

Al ministerio lerneja:

La lastaj aranĝoj de la lerneja administrado malgrandigas ankoraŭ eblecojn, ke studentoj en ĉeĥoslovakaj lernejoj lernu esperanton en la lernejoj. Nova instruplano en komercaj akademioj ellasis esperanton kiel laŭvolan fakon. Nova ekzamena regularo por instruistoj de burĝaj lernejoj malhavas esperanton inter la laŭvolaj fakoj, kvankam la malnova ekzamena regularo havis ĝin dum vico da jaroj. Ni ne povas kompreni la argumentojn por tiuj ĉi novaranĝoj. Ĉar esperanton oni efektive instruadis en pluraj komercaj akademioj, en kelkaj dum vico de sinsekvaj jaroj, al ekzamenoj pri esperanto aliĝadis kaj aliĝas kandidatoj instruistoj kaj neinstruistoj ĉe ĉiuj komisionoj, kie ekzistas la ekzamenantoj. Ni turnas nin al ministerio kun insista peto, ke esperanto estu ree enmetita en ambaŭ lokojn, el kiuj ĝi estis forigita.

Sed samtempe ni akcentas, ke la ĝisnunaj eblecoj instrui esperanton en publikaj lernejoj estas treege nesuliĉaj kaj ke pro tio la rezultoj ne povas esti kontentigaj. Tial ni denove publike rekomendas, ke oni plenumu malnovan proponon de niaj organizaĵoj, ke oni efektivigu regulan eksperimenton pedagogian, instruante esperanton en kelkaj taŭge elektitaj lernejoj diverstipaj. Ni rekomendas, ke ministerio bonvolu atente pristudi memorandumojn, kiujn ĝi ricevos de niaj organizaĵoj.

Al ministerio de poŝtoj kaj telegrafoj:

Ministerion poŝtan ni atentigas, ke jam 5 ŝtatoj eldonis poŝtajn valor-presaĵojn, destinitajn al fremdlando, kun esperantlingvaj tekstoj (Sovetlando, Lichtenstein, Hungario, Brazilo, Aŭstrio). Ni rigardas tre utila, ke simile uzu eson ankaŭ la ĉeĥoslovaka poŝto kaj ni rekomendas, ke koncernan memorandumon de niaj organizaĵoj ministerio studu detale.

Al Radio-journal:

Kun kontenteco ni konstatas, ke ĉeĥoslovaka disaŭdigado, kiam ĝi disaŭdigas en esperanto, estas en fremdlando la plej ŝatata kaj plej aŭskultata stacio el ĉiuj stacioj disaŭdigantaj esperantlingve.

Oni elektivigas tiamaniere tre elikan propagandon en fremdlando. Atestas tion miloj de konfirmoj el ĉiuj ŝtatoj europaj, eĉ el transmaraj landoj.

Al ĵurnalista sindikato:

Al ĵurnaloj kaj multaj gazetoj en nia respubliko ni esprimas nian sinceran dankon pro preteco kaj atenteco, kun kiu ili olte raportas pri faktoj signifantaj enpenetron de esperanto en diversajn fakojn de publika vivo. Ĝi atestas bonan komprenon de signifo de okazintaĵoj, ĉar ne ĉiam bruo akompanas venon de aferoj novaj. Tio, kion ni nomas sukceso, malhavas ĉiun eron de sensacio. Ke niaj ĵurnaloj raportas pri tio spontanee, tio relutas popularan opinionon, ke la ĵurnalaro turnas sian intereson ekskluzive al aferoj sensaciaj. Kaj tio estas fenomeno ĝojiga eĉ al tiu, kiu ne havas idealon komunan kun ni.

Fermo de la kongreso.

Philadelpho dankas en nomo de la kongresanoj al la kongresa komitato pro bonaj aranĝoj kaj sindediĉo al la afero. Berka invitas la kongresanojn partopreni kunvenon de katolikaj esp-istoj okazontan posttagmeze. La prezidanto dankas la kongresanojn pro la atenta partopreno en diskutoj kaj petas ilin, ke ili legu la aperontajn raportojn pri la kongreskunsidoj kaj precipe, ke ili instigu la neĉeestintojn legi kaj relegi la raportojn. Ĉiuj trovas en ili multon pripensindan kaj uzeblan en ilia poresperanta laboro. Poste li deklaras la kongreson finita.

Prezidis:
Kamaryt, Scholze.

Protokolis:
Heikenwälder, Veselý.

Sesa kongreso de ĉeĥoslovakaj esperantistoj

certe ĝojigis ĉiujn kongresanojn pro zorga preparo kaj pro la atento, kiun ĉiuj ĉeestantoj dediĉis al la kongresaj diskutoj. Anoj de la Loka kongresa komitato estis: Prez. J. Hoffner, sekr. J. Vondroušek, kas. T. Borkovec, K. Drdla, M. Adamcová, H. Střihavka, M. Jelínková, H. Šiprová. Por germanoj: R. Chlup, I. Klíma. Por katolika klubo: A. Berka. Por TRAKT J. Šamla. Ili ĉiuj, precipe la sekretario, ricevu dankon de la organizita movado. Kvankam krom la aŭtomobil-konkurado estis en Brno ankoraŭ pluraj aliaj entreprenoj, la komitato sukcesis venki la malfacilaĵojn. En la programo ekster la kunsidoj devas esti enskribita altnivela programo de la Amuza vespero 28. IX. en Stadion. Ĝi estis revuo de TRAKT-anoj. Kantis Marta Švorčíková, Vlasta Zachová, Vl. Konůpka, Jindra Loukota (naciajn kantojn kaj ariojn el operoj kaj operetoj), aktorin V. Leraus, Z. Švabíková, K. Höger,

Fr. Šlégl, Ant. Fiala, Ant. Klimeš. Konferencanto kaj ĝenerala reĝisoro estis Jos. Bezdiček. La tradukoj de versoj kaj de prozo estis de J. V. Šamla. Ili meritas apartan laŭdan mencion. Tiu juna nia kunbatalanto ŝajnas posedi maloftan kapablon aŭdi harmonion de la lingvaĵoj kaj de la muziko.

Lotumadon de la libro-premioj aranĝis kaj gvidis T. Kilián kaj T. Borkovec. Estis dividitaj inter la kogresanojn 20 libroj. Ili estas jam dissenditaj.

Statistiko de la kongresanoj.

Grupigo de la kongresanoj laŭ lokoj, el kiuj ili venis:

- 66 el Brno
- 17 el Praha
- 10 el Uherské Hradiště
- 7 el Prostějov
- 6 el Bratislava
- 15 po 5 el Bakov n. J., Mor. Ostrava, Olomouc
- 21 po 3 el Ĉes. Třebová, Dolní Bousov, Holešov, Kunovice u Uh. Hr., Liberec, Mladá Boleslav, Třebíč
- 18 po 2 el Jablonné n. O., Komárno, Košice, Lázně Bělohrad, Nový Jičín, Plzeň, Přerov, Ropice, Svitavy
- 49 po 1 el Bohutice, Ĉes. Kamenice, Ĉes. Lípa, Dětnarovice, Hluk, Hlušovice, Hor. Bojanovice, Ivančice, Jablonce n. N., Jinačovice, Karvinná, Kopřivnice, Křtiny u Brna, Kyjov, Lubné u L., Lučenec, Město Ždár n. M., Mor. Krumlov, Nové Zámky, Německé Pravno, Pardubice, Parkán, Parník, Plan, Police n. M., Poruba u O., Potštát, Pozlovce, Příbor, Skřečůň, Slavkov u B., Solka u Ném. Pr., Syrovice u R., Tasov u V. M., Třeč. Teplice, Třebovice, Turnov, Tvoříhráz u Z., Těpeře, Val. Klobuky, Znojmo, Ždánice, Židlochovice

209 ĉeĥoslov. kongresanoj el 73 diversaj lokoj. Krome 2 eksterlandanoj el Genova kaj Wien.

Fina kalkulo de la VI-a ĉs. kongreso en Brno.

Enspezoj:	
Kongresaj kotizoj (195)	Kč 2730.—
Donacoj	" 479.—
Enirpago 28. IX.	" 503.70
Anoncoj por Bulteno	" 150.—
Redonita depago	" 131.60
	<hr/>
	Kč 3984.30

Elspezoj:

Kongresejoj	Kĉ	720.—
TRAKT kaj scenejo	"	750.—
Flora dekoracio	"	56.65
Presajoj	"	585.65
Invitilo	"	283.45
Afranko kaj oficejaj bez.	"	383.60
Libropremioj	"	306.80
Reklamo	"	145.20
Depagoj	"	495.20
Diversa	"	263.55
Gajno	"	4.00

Kĉ 3 1430

Meritas apartan laŭdan mencion la relative alta sumo de donacoj. La donacintoj akceptu sinceran dankon pro ilia bonvolo.

Oficeja fondaĵo

La alvoko de nia lasta ĝenerala kunveno havis inter niaj membroj resonon tre atentindan. Multaj amikoj komprenis gravecon de la celo kaj sendis siajn kotizojn. La plej granda estas sumo da 500 Kĉ, kiun donacis nia kasisto Friedrich kiel profiton de la vojaĝo Nederlandon. Sed ankaŭ la donacintoj de la sumoj malgrandaj ricevu same varman dankon kiel li. Sube ni donas liston de la donacintoj laŭ nomaro farita de la kasisto.

Stato 1. I. 1935: 1.012.20 Kĉ. Esp. Klubo Praha 50.—, Klubo esp., Hradec Králové 50.—, Fr. Pytloun, Bakov n. J. 10.—, J. Göbelt, Vejprty 10.—, Kolekto dum ĝen. kunveno de ĈAE 221.50, Dr. Fr. Vaněk (kolekto), Dol. Bousov 20.—, Esp. Klubo Mnich Hradišti 25.—, Esp. Klubo „Comenius“, Tisovec 20.—, Dr. D. Balász, Košice 10.—, Jul. Havas, Komárno 10.—, J. Dolinský, Turč. Sv. Marín 12.—, J. Donner, Plan 5.—, Dr. J. Fousek, Přelouč 20.—, H. Popper, Böhm. Kamnitz 15.—, J. Brich, Dejvice 10.—, J. Zemek, Rumburk 10.—, P. Zévl, Rokycany 10.—, A. Čížková, Slavkov u Brna 6.—, O. Vaněk, Čes. Třebová 9.—, J. Jaroš, Praha 10.—, B. Weiner, Praha 10.—, St. Knžec, Liberec 10.—, M. Lukáš, Trnava 10.—, K. Svobodová, Dobřany u Plzně 10.—, Rud. Cikhardt, Praha 9.—, Fr. Portych, Stará Paka 5.—, B. Raichlová, Náchod 15.—, Fr. Dejnek, Praha XII. 5.—, M. Havránková, Prostějov 10.—, Jar. Budínka, Louny 10.—, B. Fišer, Lenešice u Loun 10.—, Jan Večeře, Lubná 10.—, K. Adam, H. Krč 5.—, E. Hoffmann, Trenčín 10.—, Esp. Klubo, Ml. Boleslav 20.—, Fr. Slavík, Praha 25.—, K. Šolc, Ml. Boleslav 5.—, K. Mikulič, Malacky 10.—, kolekto (ekskurso al Bohema Paradizo 1. V.) 15.—, K. Suk, Tábor 10.—, V. Fiala, Mladé

u Ĉ. Budějovic 4.—, Josef kaj V. Blažek, Olomouc 10.—, A. Bystroň, Dol. Suchá 5.—, J. Kárník, Velsel n. M. 5.—, A. Uhliar, Lučenec 10.—, Fr. Kasalý, Telč 10.—, K. Šmíd, Liblice p. Ĉ. Brod 4.—, A. Hloušek, Mšeno u Mělníka 4.—, J. Čechová, Kerhartice n. Or. 4.—, J. Krchov, Zvolen 10.—, B. Břicháčová, Trenč. Teplice 50.—, Ant. Pražák, Jablonné n. O. 10.—, Dr. F. Ulman, Mukačevo 10.—, Esp. Klubo, Kolín 15.—, Dr. Jan Rathay, Stříbro 10.—, Esp. rondeto, Žilina 10.—, K. Kolář, Písek 5.—, J. Friedrich, Košice (ekskurso al Holando) 500.—, Fr. Kruták, Mor. Nová Ves 10.—, R. Beleš, Uherská Ves 10.—, Fr. Heikenwälder, Prostějov 20.—, R. Herzegová, Praha XI. 4.—, Fr. Kasalý, Telč 8.—, Sumo 2.487.70 Kĉ.

Informaj tabuloj.

Por venonta numero de la Bulteno ni preparas la nomaron de lokoj, en kiuj la samideanoj komprenis la signifon de tiuj ĉi unikaj propagandiloj kaj kies stacidomoj estas jam ornamitaj per la belaj tabuloj. Estas jam bela vico, sed vi konstato, ke mankas inter ili lokoj tre gravaj. Esperantistojn el tiuj lokoj ni atentigas denove pri tiuj ĉi bonaj helpantoj, kiuj propagandos por vi konstante kaj plej efike. Sed ne sole en la stacidomo ili bone servas. Ili tre bone taŭgas por ĉiu klubejo kaj diversloke fiksitaj en la urbo, ili ĉiam invitos la preterpasantojn al vialoka esperanta informejo.

Lastatempajn mendintojn ni atentigas, ke la tabuloj en iliaj stacidomoj pendas tie nur depost 1-a de novembro. Tiel oni ne bezonos doni la lupagon por la nuna jaro. La sumo de ili pagita estos uzita por 1936.

Jus aperis

la senpacience jam atendata, 12-a eldono de

BES-a ADRESAROde esperantistoj el ĉiuj landoj
por la jaro 1935/36.

La belpresita, preskaŭ 100-paĝa, broŝuro enhavas 1160 adresojn kun informaj notoj kaj 78 portretojn de E-istoj el pli ol 40 landoj. — Detala registro de aliĝintoj laŭ okupo kaj inklinoj, de firmoj laŭ fakoj, ebligas al ĉiu trovi la deziratan adreson! — Tiu ĉi informriĉa, „parolanta“ jarlibro, unika laŭ plaĉa aranĝo kaj valore enhavo, bezoniga por ĉiu E-isto, kostas sole 8 Kĉ, fremdlande 1 Fsv (4 poŝt. resp.-kup.) aŭ egalvaloron. — Nova eldono en preparo. — Belaj premioj por trialiĝantoj! — Postulu detalan ilustritan prospekton de l' eldonanto:

BES (Boh. E-Servo), Potštejn

aŭ pere de Libroservo de ĈAE en Praha-Bubeneš.

ESPERANTO-ASOCIO EN ĈEĤOSLOVAKA RESPUBLIKO (EAĈSR).

STATUTO.

I. Nomo, sidejo, agadkampo, oficiala lingvo.

§ 1. La societo nomiĝas:

Esperanto-Asocio en Ĉeĥoslovaka Respubliko (EAĈSR),

Svaz esperantistů Československé republiky,
Svaz esperantistov Československej republiky,
Esperanto-Bund in der Čechoslovakischen Republik,
Esperantisták Egyesülete a Csehszlovák Köztársaságban,

Towarzystwo esperantystów Czechoslowackiej republiki,

Sojuz esperantistov Ĉeĥoslovakioj republiki.

Ĝia sidejo estas Praha. La agado de la Asocio rilatas al ĉiuj landoj de Ĉeĥoslovaka Respubliko.

Oficialaj lingvoj estas la ĉeĥoslovaka, germana, hungara, pola kaj esperanto.

II. Celo kaj agado de la asocio.

§ 2. La asocio estas societo nepolitika. Ĝia celo estas kunigadi ĉiujn esperantistojn en Ĉeĥoslovakio, veki komprenon por praktikaj kaj moralaj valoroj rezultantaj el uzado de helpa internacia lingvo esperanto, disvastigi ĝian konon kaj scion, gardi ĝian unuecon kaj ĝustecon.

§ 3. Tiun celon ĝi efektivigas precipe per jenaj metodoj:

a) Kreas lokajn grupojn tie, kie estas minimume 8 membroj, kaj kunigas ilin laŭ bezono al pli superaj unuiĝoj (distriktaj, regionaj, landaj), kiuj estas internaj organoj de la societo same kiel sekcioj kaj fakoj.

b) Kreas sekciojn laŭ la lingvo kaj fakojn laŭ diversaj ideoj aŭ profesiaj interesoj de siaj membroj.

c) Okupiĝas pri problemoj de disvastigo kaj evoluo de la internacia lingvo.

d) Aranĝas prelegojn, kursojn, ekspoziciojn, teatrajn prezentadojn, koncertojn, ekskursojn kaj aliajn sociatajn entreprenojn, celantajn al instruado aŭ disvastigo de esperanto aŭ al ĝia financa kaj morala subteno.

e) Prezentas al leĝdonaj, publikjuraj kaj aliaj aŭtoritatoj petskribojn, memorandumojn, postulojn, proponojn kaj bontrovojn kaj traktas per siaj reprezentantoj kun ĉi tiuj faktoroj pri aferoj koncernantaj helpan lingvon internacian.

f) Eldonas gazetojn, librojn kaj aliajn presafajn rilatantajn al ideo de internacia lingvo ĝenerale kaj de esperanto speciale, eventuale partoprenas en ilia eldonado aŭ zorgas pri ĝi.

g) Kreas kaj daŭrigas bibliotekojn, legejojn, kolektojn rilatantajn al la ideo de esperantismo.

h) Donas informojn pri esperanto, pri taŭgaj instruantoj, tradukantoj kaj korespondantoj esperantaj.

ch) Prizorgas abonon kaj aĉeton de gazetoj kaj libroj verkitaj en internacia lingvo aŭ ĝin koncernataj.

i) Proponas al koncernaj organoj personojn taŭgajn transpreni publikajn funkciojn, postulatajn scion de esperanto kaj organizo de la movado.

j) Kreas kaj fondas sciencajn, fakajn kaj sociatajn centrojn (kiel Esperanto-domo) helpantajn al atingo de celoj per la statuto fiksitaj, akiras tiucele nemoveblajn aŭ aliajn havaĵojn aŭ partoprenas similan entreprenadon de aliaj.

k) Kreas ekzamenajn komisionojn, kiuj aranĝas ekzamenojn pri scio de esperanto kaj eldonas atestojn pri ilia rezulto.

l) Konsilas en lingvaj problemoj kaj demandoj, gvidas kaj registras literaturan laboron esperantisman.

m) Aliĝas kiel membro al pli vastaj organizaj unuiĝoj translimaj sekvantaj la saman celon, kiom tio konformiĝas kun leĝaj normoj, aŭ aranĝas kun ili laboran kunagadon.

n) Fiksas premiojn, donas stipendiojn por subteno de intensa studo pri problemoj de la internacia lingvo kaj pri literaturo verkata en esperanto.

o) Zorgas pri pligrandigo de uzo de esperanto por diversaj celoj.

III. Havaĵo, fondaĵoj.

§ 4. Materiajn rimedojn por atingo de siaj celoj la asocio ĉerpas:

a) el membra kotizo fikсата de la kongreso,

b) el donacoj, subvencioj kaj heredaĵoj,

c) el profitoj de siaj entreprenoj.

§ 5. La asocio fondas laŭ bezono por difinitaj celoj en sia agadkampo proprajn fondaĵojn, administratajn per specialaj regularoj.

§ 6. La havaĵo de lokaj grupoj kaj de ĉiuj ceteraj formaĵoj transiras okaze de ilia disiĝo al la asocio.

IV. Membreco de la asocio.

§ 7. Membroj de la asocio povas esti ekskluzive personoj elektivaj. Estas membroj: a) honoraj, b) subtenantaj, c) aktivaj, d) kotizantaj.

Honora membro fariĝas, kiu estas nomita tia en ĝenerala kunveno laŭ propono de la centra komitato pro meritoj pri esperantismo aŭ pri la asocio. Honora membro ne pagas kotizojn.

Subtenanta, aktiva, kotizanta membro fariĝas, kiu aliĝis kiel tia membro, estas de la estraro akceptita kaj pagis fiksitajn kotizojn. Rifuzo de membra aliĝo okazas sen sciigo pri kialoj kaj oni ne povas kontraŭi ĝi apelacii.

§ 8. La membroj rajtas partopreni en ĉiuj kunvenoj kaj entreprenoj por la membraro aranĝataj,

debati en ili kaj fari proponojn, voĉdoni, elekti kaj esti elektataj en ĉiujn komitatojn kaj instituciojn de la asocio, uzi rimedojn citatajn en § 3, enrigardi aktojn kaj librojn asociajn dum ĉeesto de komitatano, porti asocian insignon.

§ 9. La membroj devas helpadi ĉiamaniere por atingi de la celo de la asocio (§ 2), agi laŭ la statuto kaj decidoj de la kongreso kaj de centra komitato, ĝuste plenumadi komisiitajn funkciojn kaj — escepte honoraj membroj — ĝuste pagi la kotizojn.

§ 10. Membro ĉesas esti:

a) kiu sciigis skribe al la komitato de loka grupo aŭ tie, kie loka grupo ne estas, senpere al la estraro de la asocio sian eksigon;

b) kiu estas elstrekita el la membrolisto per la komitato de loka grupo aŭ tie, kie loka grupo ne estas, senpere per la estraro de la asocio pro la kaŭzo, ke li ne pagis por kuranta jaro malgraŭ ĝusta admono membran kotizon;

c) kiu estas eksigita de la komitato de la grupo aŭ de la asocia estraro pro grava malobeo kontraŭ la statuto, pro agado kontraŭ interesoj de la asocio aŭ pro nemorala faro.

§ 11. La decidon pri elstreko aŭ eksigo transdonas koncerna komitato (laŭ § 10 c) al la eksigito skribe citante motivojn. La eksigito povas en limo de 14 tagoj de enmanigo de ĉi tiu decido apelacii al ĝenerala kunveno de loka grupo (se li estas eksigita de la komitato de loka grupo) kaj kontraŭ ĝia decido en la sama templimo al la estraro de la asocio kaj poste al la centra komitato, kiu decidas kun definitiva valideco. — La rajto eksigi membron apartenas ankaŭ al ĝenerala kunveno de loka grupo; tiuokaze la eksigito povas apelacii en la fiksita tempolimo al la estraro de la asocio kaj poste al la centra komitato. Eksigito de la asocia estraro rajtas apelacii en la destinita tempolimo sole al la centra komitato. — Antaŭ valida decido pri la eksigo la eksigito ne povas apliki la membrajn rajtojn, sed same ne estas devigata plenumi membrajn devojn. — La komitato de loka grupo sciigas pro registro validan eksigon al la estraro de la asocio. Membro, kiu eksigis aŭ estis eksigita, devas redoni la asocian membrokarton.

V. Administrado de la asocio.

§ 12. Administraj organoj de la asocio estas: kongreso, centra komitato, estraro kaj kontrola komisiono.

VI. Kongreso.

§ 13. La plej supera decidrajta organo de la asocio estas la kongreso, kiun partoprenas kune elektitaj reprezentantoj de lokaj grupoj kaj izoluloj en lokaj grupoj ne organizitaj. Elekton de reprezentantoj oni faras en ĝeneralaj aŭ membraj kunvenoj de okaj grupoj ĉu per aklamo (se la elekto estas unu-

anima) ĉu per balotiloj. Samtempe estas elektata ankaŭ sama nombro da anstataŭantoj. La reprezentantoj kaj anstataŭantoj estas elektataj por ĉiu kongreso speciale. Elektitaj reprezentantoj de lokaj grupoj havas tiom da voĉoj, kiom da membroj havas la grupo. La grupo povas elekti reprezentanto et tian asocianon, kiu ne estas ĝia membro. La reprezentantoj legitimis sin per rajtigaj dokumentoj, atestitaj de la komitato de la grupo kun indiko de nombro da membroj, kiujn ili reprezentas kaj nombro da voĉoj al ili donitaj, se la grupo elsendas pli ol unu reprezentanton. Asocianoj, kiuj ne estas membroj de iu loka grupo, povas sin reprezentigi en kongreso per alia asociano tiel, ke ili lin skribe delegas.

§ 14. Kongreson kunvokas la centra komitato, kiam ajn ĝi trovas tion bezona, tamen minimume unufoje en la jaro. La estraro de la asocio devas publikigi inviton al la kongreso kune kun programo minimume 4 semajnojn antaŭe en gazeto de la asocio aŭ per specialaj invitiloj.

Se la kongreso estas ĝustatempe kaj regule laŭ la statuto kunvokita, ĝi kapablas decidi valide, estu la nombro de ĉeestantoj kiu ajn, sed ne povas decidi pri disiĝo de la asocio.

Proponojn de sekcioj, fakoj, lokaj grupoj aŭ asocianoj, kiuj estas traktotaj en tagordo de kongreso, estas necese prezenti skribe al la estraro de la asocio plej malfrue 14 tagojn antaŭ la ĝenerala kunveno. Ĝenerala kunveno decidas per simpla plimulto de ĉeestantoj kaj reprezentataj voĉoj, krom kazoj speciale difinitaj.

§ 15. Kongreso estas kompetenta:

a) ŝanĝi, kompletigi kaj interpreti la statuton kaj akcepti regularojn, ŝanĝi, kompletigi kaj interpreti ilin per decido de du trionoj de ĉeestantoj kaj reprezentataj voĉoj;

b) ekzameni kaj aprobi raportojn kaj proponojn de la centra komitato kaj kontrola komisiono;

c) konsiliĝi kaj decidi pri proponoj de membroj, lokaj grupoj, fakoj kaj sekcioj, prezentitaj en laŭregula formo;

d) fiksi sumojn de membraj kotizoj;

e) decidi pri administro de la havaĵo kaj fondaĵoj;

f) ŝanĝi decidojn de administraj organoj;

g) nomi honorajn membrojn de la asocio;

h) elekti por tempo de tri jaroj dekdu membrojn de la centra komitato kaj 6 anstataŭantojn; el tiuj eksigas ĉiujare en la tago de kongreso 4 komitataj kaj 2 anstataŭantoj kaj estas anstataŭataj per nove elektitaj; eksigontojn por la dua kaj tria jaro de unua jarotrio fiksas la centra komitato per loto;

ch) elekti por tempo de unu jaro 3 membrojn de la kontrola komisiono kaj 2 anstataŭantojn;

i) decidi pri disiĝo de la asocio.

VII. Centro.

§ 16. La centran komitaton formas:

- a) 12 membroj elektataj de la kongreso por tri jaroj;
- b) reprezentantoj de la sekcioj, kiujn elektas ĝeneralaj kunvenoj de la sekcioj, nome po unu reprezentanto kaj po unu anstataŭanto por ĉiu komenca cento da sekcianoj ĉiam por unu jaro;
- c) reprezentantoj de lokaj grupoj po unu por ĉiu kompleta cento da membroj, elektataj de jaraj kunvenoj de la grupoj por unu jaro.

§ 17. Dum 8 tagoj post kongreso elektas la komitato el si la prezidanton, du vicprezidantojn, ĝeneralan sekretarion, sekretarion, kasiston, librotenananton kaj aliajn funkciulojn kaj anstataŭantojn laŭ bezono de aktuala situacio de la laboroj. Ĉi tiuj funkcioj formas la estraron de la asocio. La prezidanto aŭ unu el la vicprezidantoj kaj ĝenerala sekretario devas loĝi en Praha.

§ 18. La centran komitaton kunvokas la prezidanto regule almenaŭ duonjare aŭ se tion postulas triono de membroj de la centra komitato. Por valida decido necesas 8 membroj de la komitato. La decidado fariĝas per simpla plimulto de la voĉoj. Okaze de voĉegaleco decidas la prezidanto.

§ 19. La centra komitato kunvokas ĝeneralan kunvenon, plenumas ĝiajn decidojn, kreas sekciojn kaj fakojn, gvidas ĉiun agadon de la asocio, kiun ĝi ne komisiis al la estraro.

§ 20. La estraron kunvokas la prezidanto laŭbezzone aŭ se tion postulas 3 komitatanoj. Por valida decido estas bezona almenaŭ duono de la membroj kaj simpla plimulto de ĉeestantaj voĉoj. Okaze de voĉegaleco decidas la prezidanto. Estraranoj, kiuj ne venis sen ĝusta senkulpigo al 3 sinsekvaj kunvenoj, estas eksigebraj el membreco de la estraro.

§ 21. La estraro efektivas ĉiujn decidojn de kongreso kaj de la centra komitato, prezentas al la centra komitato raportojn pri sia agado, dungas kaj maldungas salajratajn laborantojn, administras havaĵojn kaj fondaĵojn de la asocio, interkonsentas kontraktojn, akceptas kaj eksigas membrojn, aprobas starigon de laboraj komisionoj, nomas lokajn delegitojn kaj kreas lokajn grupojn de la asocio, kunvokas regionajn aŭ fakajn konferencojn, elsendas en nomo de la asocio deputitarojn, kaj ĝenerale plenumas agadon cititan en § 3, kiu ne estas speciale rezervita al centra komitato aŭ kongreso.

§ 22. Kompetenteco de unuopaj membroj de la estraro:

1) La prezidanto reprezentas la asocion rilate al aŭtoritatoj kaj al ekstero, kunvokas kaj gvidas kunvenojn, ekfunkciigas anstataŭantojn en la centra komitato kaj kontrola komisiono anstataŭ eksigintaj aŭ mortintaj anoj, aprobas necesajn elspezojn ĝis sumo fiksa de centra komitato, subskribas ĉiujn dokumentojn kun la ĝen. sekretario kaj dokumentojn de financa enhavo ankaŭ kun la kasisto.

2) Unua kaj dua vicprezidantoj substituas la prezidanton, kiam ili estas pri tio petitaj aŭ se la prezidanto estas okupata alimaniere.

3) La ĝenerala sekretario gvidas agadon kaj korespondadon asocian, faras kun la prezidanto preparajn laborojn por kunvenoj kaj kongresoj, prizorgas aktojn por aŭtoritatoj, raportas al la centra komitato kaj kongreso pri agado asocia, kunsuskribas dokumentojn asociajn, deponas ĉe si la societian stampilon.

4) La sekretario prizorgas precipe anoncadon de ĉiuj kunvenoj, faras kaj dissendas por ili invitilojn kaj legitimajojn, zorgas en kunvenoj pri enskriboj en listo de ĉeestantaj membroj, protokolas paroladojn en kunvenoj, liveras al gazetoj raportojn pri agado de la asocio, zorgas pri kreado de lokaj grupoj kaj subtenas, eĉ laŭbezzone anstataŭas, la ĝen. sekretarion en lia agado.

5) La kasisto ricevas monon al la societo venantan, zorgas pri pago de ŝuldoj, membraj kotizoj, pagas fakturojn aprobitajn de la centra komitato; kun la prezidanto li kvitanças sur membrokartoj ricevon de membraj kotizoj kaj subskribas dokumentojn kun enhavo financa kun la ĝen. sekretario kaj kun la prezidanto, administras membran matrikulon, eldonas membrajn legitimilojn kaj zorgas pri aligo de novaj kaj konservo de malnovaj membroj.

6) La librotenanto gvidas librotenanadon de la asocio laŭ dokumentoj transprenitaj de la kasisto kaj zorgas pri ĝustatempa pretigo de budĝeto por la kongreso.

7) Al ceteraj komitatanoj destinas la centra komitato diversajn laborkampojn kaj funkciojn, kiel montriĝas bezone.

§ 23. Se vakiĝas iu posteno en la centra komitato aŭ en la estraro pro morto, rezigno je funkcio, eksigo aŭ eksigo el la asocio aŭ se estas deklarita eksigo de iu el membreco en la komitato, ekfunkciigas la estraro anstataŭanton.

Se iu estrarano prenas libertempon pli longan ol unu monato aŭ se li estas pro alia kaŭzo sen sia kulpo pli ol unu monaton plenokupata, la estraro povas per maniero pli supre citita ekfunkciigi anstataŭ li anstataŭanton por tempo de lia okupateco. En ĉiu kunveno de la estraro por forestantaj anoj prenas lokon anstataŭantoj laŭ vico fiksa per loto en fonda kunveno de la estraro.

VIII. Kontrola komisiono.

§ 24. La kontrola komisiono elektata de la kongreso revizias mastrumon de la asocio kaj de ĝiaj entreprenoj kaj fondaĵoj kaj povas doni al la centra komitato kaj estraro iniciatajn proponojn celantajn al plibonigo de la asocia mastrumado. Anoj de la kontrola komisiono estas invitataj al kunvenoj de la centra komitato kaj estraro kaj ili havas tie voĉon konsilan.

La kontrola komisiono rajtas ankaŭ revizii mastrumadon de lokaj grupoj kaj de ĉiuj organizaj formoj de la asocio, al kiuj estis permesite administri parton de asocia havaĵo.

Pri rezultoj de siaj periodaj revizioj la kontrola komisiono prezentas raporton al la centra komitato, pri rezulto de jara revizio al kongreso de la asocio.

IX. Anstataŭantoj.

§ 25. La anstataŭantoj de la centra komitato, estraro kaj de la kontrola komisiono estas invitataj al ĉiu kunveno de la centra komitato respektive de la estraro kaj kontrola komisiono; ili povas partopreni traktadon en ili, sed voĉdoni nur tiam, kiam ili anstataŭas forestantajn membrojn.

X. Lokaj grupoj.

§ 26. Lokaj grupoj sub nomo „Esperanto-Asocio en Ĉeĥoslovaka Respubliko, loka grupo en . . .“ povas esti kreataj tie, kie estas almenaŭ 8 membroj. Ili direktiĝas per statuto ricevita de la centro. Kongreso asocia liksas jaran kotizon, kiun pagos por siaj anoj la grupo al la asocio. Ĝenerala kunveno de loka grupo povas decidi pri aliĝo de la kotizo por lokaj aŭ aliaj celoj.

§ 27. Lokaj grupoj en certa distrikto, regiono, lando povas unuiĝi por ligoj distriktaj, regionaj, landaj. Kondiĉo de unuiĝo por ligo estas, ke unuigu minimume 5 grupoj. Rimedoj financaj venas al ĉi tiuj ligoj el specialaj kotizoj de grupoj lokaj, kiujn al ili tiuj ligoj per decido de ĝenerala kunveno fiksas.

§ 28. Administradon de ligoj gvidas komitatoj konsistantaj el reprezentantoj de grupoj, kiuj elsendas por ĉiuj komencitaj 10 anoj po unu reprezentanto en komitaton de la ligo.

XI. Sekcioj laŭ la nacia lingvo.

§ 29. La centra komitato kreas sekciojn laŭ lingvo de la membraro. La membrojn al ĉi tiuj sekcioj anigas la estraro laŭ aliĝilo de la membroj.

La sekcioj gvidas laboron propagandan en sia lingva sfero. Siajn regularojn kaj planon de agado fiksas ĉi tiuj sekcioj en interkonsento kun la asocia estraro. Aprobas ilin la kongreso. La jarkunveno de la sekcio elektas prezidanton, sekretariojn kaj ceterajn komitatanojn de la sekcio. La nombron de siaj komitatanoj liksas la kunveno laŭ sia bontrovo. La ĝenerala kunveno de la sekcio havas devon elekti tiom da anoj de la centra komitato, kiom ĝi rajtas laŭ sia membro-nombro. La sekciaj ĝeneralaj kunvenoj devas okazi ĉiun jaron en januaro-februaro. La komitatoj de la sekcioj plenumas siajn taskojn laŭ la sekciaj regularoj. Financajn rimedojn disponigas al la sekcioj la centra komitato laŭ nombro de membraro de unuopaj sekcioj.

XII. Fakoj.

§ 30. La centra komitato kreas laŭ postulo de membraro fakojn por specialaj ideaj aŭ profesiaj intereso de membraro. Siajn regularojn faras ĉi tiuj fakoj en interkonsento kun la estraro. Financajn rimedojn prizorgas por si la fakoj mem; la centra komitato povas subteni al iliaj celoj el havaĵo de la asocio laŭ libera bontrovo. Iliaj devoj kaj rajtoj estas fiksataj antaŭ la starigo per kontrakto.

XIII. Arbitracia tribunalo.

§ 31. Konfliktojn devenintajn el societaj interrilatoj forigas arbitracia tribunalo. La arbitracian tribunalon kunvokas por ĉiu kazo prezidanto de la asocio (se temas nur pri konflikto en loka grupo, la prezidanto de ĉi tiu grupo) tiel, ke li ricevigas al ĉiu partio inviton, ke ĝi elektu el asocianoj du arbitraciajn juĝantojn. Ĉi tiuj per plimulto de voĉoj elektas el asocianoj kvinan membron prezidanto. Okaze de egaleco de voĉoj decidas loto pri persono de prezidanto. Se iu konfliktanta partio, kvankam invitiĝe, ne destinas dum 14 tagoj 2 arbitraciajn juĝantojn, aŭ se la arbitraciaj juĝantoj ne venis, la centra komitato (ĉe loka grupo ĝia komitato) elektas mem arbitraciajn juĝantojn el asocianoj. Se centra komitato mem estas konfliktanta partio, ĝi ripete invitas la duan konfliktantan partion nomigi la arbitraciajn juĝantojn. Kiam kunsidas la arbitracia juĝantaro, devas ĉeesti ĉiuj ĝiaj membroj kaj decido fariĝas per simpla plimulto de voĉoj. Kontraŭ decido de arbitracia juĝantaro ne estas apelacio. Verdikton de la arbitracia juĝantaro plenumas la centra komitato, ĉe loka grupo ĝia komitato.

XIV. Disigo de la grupoj kaj fakoj kaj finiĝo de la asocio.

§ 32. Grupon aŭ fakon, kiuj malobeis kontraŭ la statuto aŭ grave malutilis programon de la asocio aŭ organizan disciplinon, precipe se ĝi ne agas laŭ decidoj de la kongreso aŭ la centra komitato, povas disigi la centra komitato, aŭdinte la estraron de la asocio.

§ 33. La asocio disiĝas, se decidis pri tio kongreso. Por valideco de ĉi tiu decido estas bezone:

- a) ke estu al la kongreso invititaj ĉiuj asocianoj per specialaj invitiloj, en kiuj estas sciigite, ke estas traktota disiĝo de la asocio;
- b) ke en la kongreso ĉeestu aŭ estu reprezentataj du trionoj de ĉiu membraro;
- c) ke por disiĝo voĉdonu tri kvarono plimulto de ĉeestantoj kaj reprezentataj membroj.

La kongreso, kiu decidis pri disiĝo de la asocio, decidas samtempe pri tio, kiel disponi pri restanta havaĵo.

(Aprobata de ministerio de interno per dekreto el 26-a aŭgusto 1935, n-ro 52.003/1935.)

Regularo de la Sekcioj.

§ 1. *Nomo*: Esperanto-Asocio en Ĉeĥoslovaka Respubliko, sekcio.

§ 2. *Sidejo*: estas fiksata de la ĝenerala kunveno.

§ 3. *Celo kaj tasko*: Gvidi, organizi kaj fari propagandan laboron por esperanto inter . . . lingva publiko en ĈSR.

§ 4. *Rimedo*: La sekcio efektivas la taskojn antaŭviditajn en la § 3-a de la statuto. La alineojn c, d, f, g, h, ch, i, l, n, o ĝi efektivas aŭtonome. La taskojn de alineoj a, e, k ĝi efektivas nur post interkonsento kun la centra komitato, se tiu ĉi komisiis la sekcion plenumi difinitan taskon antaŭviditan en la koncernaj alineoj.

§ 5. *Financoj*: La enspezoj de la sekcio konsistas:

1) el la dotaĵo el la centra kaso, kiun fiksas centra komitato proporcie laŭ nombro de la sekciaj anoj;

k) el enspezoj, kiujn la sekcio akiras el fontoj antaŭviditaj en § 4 b, c, kaj § 5 de la asocia statuto.

§ 6. *Membroj* de la Sekcio estas ĉiuj anoj de EAĈSR, kiuj indikis sian naciecon tiun de Sekcio.

§ 7. *Administrado*: Administraj organoj de la sekcio estas: ĝenerala jarkunveno kaj sekcia komitato. Tasko de la ĝenerala jarkunveno estas: Prijuĝi raporton pri agado de la komitato. Fiksi nombron de la anoj de la sekcia komitato. Fiksi sidejon de la sekcio. Elekti Sekcian komitaton por unu jaro. Elekti anojn de Centra komitato (respektivan nombron laŭ stato de anoj). La ĝen. kunveno okazas ĉiun jaron en januaro-februaro.

La komitato konsistas el prezidanto, vicprezidanto, sekretario, vicsekretario kaj ceteraj funkciuloj, kiel decidis ĝenerala kunveno.

La kompetentecoj de la komitatanoj estas analogiaj al tiuj antaŭviditaj en § 22 de la Statuto por la anoj de la Estraro.

(Akceptita en Fonda kongreso 28-an de septembro 1935 en Brno.)

Kroniko esperantista en ĈSR.

Novaj gvidlibroj esperant-lingvaj. Ministerio fervoja eldonis du gvidlibretojn, lukse presitajn sur kreta papero. 32 paĝojn, 23x11 cm, kun multaj ilustraĵoj kaj landkartoj. Unu estas titolita: Dr. Jiří Král, La montaro Krkonoše (Riesengebirge). I-a eldono. Ĉeĥoslovakaj ŝtataj fervojoj. La dua: Ĉeĥoslovakio. Propagandaj monografioj de ĉeĥoslovakaj ŝtataj fervojoj. Redaktas Fil. Dro Jos. Bělohav. I. Altaĵ Tatroj. X-a eldono. Ministerio de fervojoj. Ambaŭ broŝuroj estas tradukitaj de Otto Ginz. — Esp-ista Klubo en Uhereské Hradiště eldonis faldprospekton pri sia urbo, 12 pĝ, 23x11 cm, kun 9 ilustraĵoj.

Biciklon „Esperanto“ fabrikas firmao **Eska** en Ĉeb. Ĝi meritas rekomendon de esperantistoj.

Internacia ekspozicio de blindula preso en Praha 8.—31-an de majo havis ampleksan standon de esperantlingve presitaj tekstoj, lerniloj de es-po kaj diversaj dokumentoj el 14 landoj. En la ekspozicio kiel tuto estis materialoj de 43 institucioj el 24 landoj. La Esperanto-fako estis aranĝita de SOCNE. Komuna vizito de ĝiaj anoj okazis la 25. V., organizita de V. Echtner. Venis krom multaj blinduloj reprezentantoj de ĉiuj espistaj societoj en Praha, inter ili vicprezidanto de ĈAE dr. A. Pitlik. Ili estis

salutitaj de ekspozicia komitatano Pazderka ĉeĥlingve kaj de SOCNE-prezidanto Ant. Kuchař esperantlingve. La afiŝo de la ekspozicio havis ankaŭ esperantan tekston.

Katolikoj. Ligo de katolikaj esp-istoj konsekriĝis solene sian flagon 23. VI. en kapelo de s-a Venceslao en katedralo de s-a Vito. La ceremonion je la 8-a horo faris episkopo dro Ant. Eltschkner. Post la konsekro sekvis solena meso kaj komuna komunio. — Landa kunveno de katolikaj esp-istoj okazis 28. VI. en Praha en kadro de la I-a Tutŝtata katolika kongreso. Prezidis episkopo Dro Ant. Eltschkner. En nomo de ĉeĥoj parolis P. J. Mašek, en nomo de moravianoj P. Ferd. Pokorný, en nomo de slovakoj Al. Macek, en nomo de silezianoj Josef Kania, en nomo de germanoj P. Dro Jul. Hewera. En nomo de eksterlandanoj: Jos. Chiba el Wien kaj Wim el Helmond (Nederlando).

Ĉs. Laborista Asocio Esperantista (sidejo Aussig, Beethovenstr. 19) havis sian IV-an jarkunvenon 28. VII. en Podmokly. Estis decidite unuiĝi kun Laborista Esp-o-Asocio (sidejo Plzeň). Anstataŭ la „Socialiston“ ricevados la anoj „Bultenon“ el Plzeň. Estis elektitaj: prezidantoj Fischer kaj Ed. Paul, sekretarioj Fráze kaj Richter, kasistoj Jeschke kaj Böhm.

Regiona konferenco en L. Bělohrad 20. kaj 21-an de julio kunvenigis ĉ. 80 esperantistojn. Sabaton vespere ili ĉeestis Solenan

vesperon aranĝitan de la urbestro por kunveno de „Rondeto de amikoj, gastoj kaj samurbanoj bělohradaj“. Dimanĉon antaŭtagmeze ili vizitis regionan „Ekspozicion de l'arto, scienco kaj verkado“, aranĝitan pro 50-jara jubileo de banejo. La ekspozicio enhavis ankaŭ ampleksan Esperanto-fakon, plejparte el Asocia materialo. Posttagmezon je la 14-a horo okazis solena inaŭguro de „Aleo de Dro L. L. Zamenhoj, krinto de Esperanto“. La nomigo de la aleo antaŭ la Sokolejo per la nomo de Zamenhof estis decidita de la urba reprezentantaro la 31. V. 1935. La solenan inaŭguron malfermis prezidanto de la Klubo E. Beran. Vicurbestro J. Linke (eksmembro de nia Kontrola komisiono) salutis ĉeestantajn gastojn, precipe f-inon H. Tamminen el Helsinko, delegiton de ĈAE Dron A. Pitlík, del. de GEL Bruno Gahler, iniciatinton de la esperantista somerrestadejo Otto Sklenčka kaj aliajn. La vicurbestro konfirmis gravan intereson, kiun havas por esperanto la administroj urba kaj baneja pro la rezultoj de la somerrestadejo. Post deklamo de la „Preĝo sub verda standardo“ (Kořvancová) parolis en nomo de ĈAE vicprezidanto Dr. A. Pitlík, en nomo de GEL B. Gahler kaj Hilde Linhart, en nomo de la unuaj fremdlandaj gastoj f-ino Tamminen, en nomo de E. Klubo en Praha prezidanto J. Šustr. Per saluto de Svárovský en nomo de esp-istoj-laboristoj la soleno estis finita per kanto de „Espero“.

Parolad-vojaĝo de ĉs. fervojistoj. J. Kotoulek kaj T. Čisler, fervojistoj en Nové Zámky, entreprenis laŭ invito de Internacia Transport-Federacio paroladvojaĝon. En dua duono de julio 1935 ili vizitis Germanujon, Nederlandon, Belgujon, Francujon, Svislandon, Aŭstrion kaj Kotoulek faris en la pli gravaj urboj esperantlingvan paroladon pri „Ĉeĥoslovakujo kaj ĝiaj fervojoj“. La vojaĝo daŭris 18 tagojn kaj vekis en fremdlando same kiel ĉe ni meritatan atenton. La ambaŭ samideanoj akceptu nian gratulon al sia grava entrepreno.

Novaj floroj kun esperanto-nomoj. La granda roz-kulturisto J. Böhm en Blatná nomigis novan varieton de rozo de si kulturitan „Dro Zamenhof“. — J. Dokoupil, dalio-kulturisto en Velké Opatovice nomigis novan dalio-varieton „Esperanto“.

Bibliotekoj de esperanto-grupoj en Ĉeĥoslovakio. Per nia cirkulero 21. I. 1935 ni turnis nin al ĉiuj samideanaj grupoj kun peto sciigi, ĉu ili posedas grupan bibliotekon kaj kiom da volumoj ĝi enhavas. Ni

donas tie ĉi liston, kiun ni kompilis laŭ ricevitaĵoj kaj ankaŭ el aliaj informiloj. Tamen mankas ankoraŭ kelkaj lokoj. Tiujn ni petas pri koncerna sciigo, ke povu baldaŭ aperi kompletigo de tiu ĉi nomaro. Ankaŭ ni petas amike la grupojn, kiuj ne posedas ankoraŭ la bibliotekon, ke ili fondu ĝin, konservante la librojn kaj gazetojn acetatajn.

Bratislava	450	volumoj
Hradec Králové	327	„
Kolín	56	„
Košice	110	„
Lubná p. Sebranice	6	„
Lázně Bělohrad	30	„
Mladá Boleslav	29	„
Liberec (GEL-grupo)	590	„
Plzeň (E. Klubo)	504	„
Praha (E. K.)	1350	„
Radvanice („Nova vivo“)	202	„
Stonava	80	„
Tisovec	60	„

La nombroj donitaj estas el komenco de jaro 1935.

Estona karavano. Karavano 42-membra de Esperanta Turista Komisiono, gvidita de s-ro Henrik Seppik el Tallinn al la kongreso en Italio traveturis dum sia vojaĝo alkongresa kaj dum la reveno en aŭtobuson nian landon. Laŭ peto de ĈAE liberigis la ministerio de financoj en interkonsento kun la ministerio de fervojoj la karavanon de la impostoj motorveturila kaj transporta kaj informis pri tio la limajn doganejojn. Dum la unua eniro la 26-an de julio restis la karavano tempon tute mallongan en la respubliko. La samideanoj de Brno tre longe atendis la malfruiĝintan aŭtobuson kaj ĝisatendis ĝin sole la plejaj fervoruloj ne hezilitaj atendi ĝis horo tre malfrua, por tiam kontentiĝi per nelonga intersalutado. La aŭtobuso devis tiam rapidi por atingi sian celon. Ĉe la revojaĝo estis anoncita la karavano al Praha por la 19-a de aŭgusto kaj la Esperantista klubo preparis por tiu tago la akcepton. Por ke la karavano povu rekte veturi en la preparitan loĝejon, ĈAE deponis surlime bonvenan leteron por la karavano, enhavantan ĉiun informon. Grupo de samideanoj promesis krome atendi ĉe la rando de la urbo por ne maltrafi la gastojn. Malfeliĉe eĉ tiu alveno ne okazis laŭprograme, la aŭtobuso alvenis jam 18-an de aŭgusto kaj tra alia vojo. La karavano ne eksciis tiel pri la faritaj aranĝoj kaj la aranĝantoj ne sciis pri la karavano. Fine tamen ĉio feliĉe solviĝis. Dormejo estis ra-

pide preparita, helpantaj samideanoj trovitaj, presoficejo kaj ĝiaj fotografistoj informitaj kaj ŝajnas, ke ĉiuj estis kontentaj. La membroj de EK Praha bone zorgis pri gvidado de grupoj kaj de unuopuloj, la bela aŭtobuso estona kun frapa surskribo „Esperanta Turista Komisiono“ kaj kun esperanta flago per siaj traveturoj kun kelkfoja halto en la urbo faris bonegan propagandon. La gastoj (laŭ s-ro Seppik: 30 geestonoj, 10 gelatvoj, 1 svedo, 1 germano) foriris 20-an de aŭgusto en direkto al Berlino. Niaj membroj nefacile adiaŭis la simpatiajn karavanojn kaj ilian gvidanton.

Karavano de ĉsl. fervojistoj tra Holando. Post la sukcesplena aranĝo de la granda fervojista karavano tra Rumanujo en junio 1934, entreprenis la Esperantista Klubo en Košice en julio 1935 vojaĝon al Nederlando. 41 personoj (plejparte fervojistoj kun edzinoj) sub la gvidado de la konsilisto de ŝt. fervojoj J. Friedrich vizitis unue Berlinon, kie oni vizitis dum unu tago dank' al la bona preparo de la talenta organizintino s-ino Martha Mólke, ne nur kelkajn el la plej gravaj urbaj vidindaĵoj, sed ankaŭ Potsdam, Wannsee kaj Spandaŭ. La sekvintan tagon matene atendis la karavano en la limstacio 2 holandaj kamaradoj-esp. laboristoj kaj baldaŭ atendis nin la tuta grupo de nederlandaj kamaradoj en la stacidomo de Amsterdam. Al Amsterdam kaj ĝia ĉirkaŭaĵo (tre interesaj fiŝistaj vilaĝoj Ymuiden, Monnikendam, Volendam, insulo Marken) ni povis dediĉi nur 3 tagojn, kio longe ne sufiĉis por vidi almenaŭ pli grandan parton de la artriĉaĵoj kaj de vigla, nekutima por ni, vivo ĉe la maro, tamen ĝi postlasis en nia memoro neforgeseblajn impresojn. En Naarden ni kliniĝis antaŭ la tombo de nia granda Comenius, sur kiun ni en la akompano de la simpatia vicurbestro metis grandan florkronon. — Rapide sekvis la pluaj tagoj en Haag, kie ni ne forgesis viziti ankaŭ la domon, kie instruas s-ano Ĉeh, Scheveningen, en la pentrinda Delft, en granda haveno Rotterdam, kaj jam alproksimiĝis la lasta tago — sed unu el la plej belaj — de nia restado en Holando: belega Utrecht kun sia riĉa ĉirkaŭaĵo. Kvaŭaŭ en sonĝo ni rapideĝis per niaj aŭtobusoj tra la senĉesaj parkoj kaj ĝardenvilaĝoj de tiu ĉi enviinda lando. Nur 6 tagojn ni pasigis en Nederlando, sed dank' al la senlacaj klopodoj kaj tre amika akcepto de nederlandaj esp. kamaradoj-laboristoj, el kiuj mi devas nomi almenaŭ k-adojn

Demmenie, Klátíl, Muller el Amsterdam, Worms el Haag kaj Cohen el Utrecht, ni havis feliĉan okazon vidi Nederlandon ne nur el la ekstero, sed ni ekkonatiĝis kun multaj flankoj de ĝia interna vivo kaj penado. Pri la forto de esp. movado en Nederlando servu ĉi tie la ekzemplo, ke la paroladon pri Ĉeĥoslovakio, kiun aranĝis s-ano Pech el Plzeň, ĉeestis en Amsterdam pli ol 300 pers. kaj oni ne bezonis traduki el esperanto. Dum la returna vojaĝo ni vizitis ankoraŭ Leipzig, kie nin akceptis ankaŭ tre amike s-ano B. Kötzt, kiu aranĝis kun helpo de la urba trafikaj unuigoj nian viziton tra la urbo. La afableco kaj servopreteco de esperantistoj forte influis ĉiujn partoprenintojn de la vojaĝo. Kaj ne nur la morala, sed ankaŭ la financa efiko de la entrepreno estis bona. Spertis tion oficeja fondaĵo de ĈAE, kiu pliriĉiĝis je 500 Kč, kaj kaso de Esperantista Klubo en Košice, kiu enspezis preskaŭ 700 Kč dank' al la bonvolo de ĉiuj partoprenintoj, kiuj konsentis doni la restojn de nia komuna kaso al tiuj ĉi celoj. Ni kredas, ke multajn el la partoprenintoj ni renkontos baldaŭ en nia esperantista rondo.

Lokaj informoj.

Bakov n. J. Prelego de s-o Pytloun pri lia vojaĝo Danujon 8. IX.

Bratislava. Ĝen. kunveno de E. K. 6. XI. festis 25-jaran ekziston de la loka grupo. Ĝia fondinto kaj ĝisnuna gvidanto E. Wanitsek estis unuanime elektita honora membro. Kunvenoj ĉiun merkredon en YMCA (str. Valy) je la 19 h.

Brno. Dum la propaganda semajno aperis multaj anoncoj pri la kurso, sur lokoj tre frekventataj estis lokitaj tre bele pentritaj tabuletoj (15) informantaj pri kurso. En la sama semajno aperis raportoj pri la kongreso. La kurso komenciĝis la 8. X. kun 38 p. (novaj homoj). Kurson gvidas J. Vondroušek.

Ĉeĥá Třebová. Post fino de la kurso en marto kunvokis per tre bona cirkulero „Libera Unuiĝo de Esperanto-amikoj“ (Ĉerná, Vaněk) kunvenon de „ĉiuj anoj de esperanta ideo“ al kunveno 20. IX. por priparoli viziton de la kongreso en Brno kaj konsiliĝi pri aŭtunaj laboroj. Fondo de loka grupo estas preparata.

Dolní Bousov. EK aranĝis belan ekspozicion en la urba domo. La ekspozicio, montrinta la grandegan disvastigon de la movado en la tuta mondo, havis plenan sukceson. Ĉirkaŭ 400 vizitintoj.

Františkovy lázně. 10. VI. kunveno de DTJ Plzeň ĉe la monumento de E.; propaganda parolado de s-ro Pech el Plzeň.

Kladno. Okaze de Foira Ekspozicio (29. VI.—28. VII.) vizitis la urbon kaj parolis en la foira radio finna samideanino f-ino Elmi Tamminen (7. VII.). „Esperanto-lako“ estis en lernejo „U Floriána“.

Kopřivnice. 14. VII. laborkunveno de REL kaj ekskurso al Štramberk.

Hluk. Post fino de la kurso estis fondita E-Klubo kun 23 anoj. Kunvenoj ĉiun merkredon en gastejo Svadbřk.

Jaroměř. La klubaj kunvenoj regule en hotelo Blua Stelo. Kurso de Kleriga komisiono kun 10 p.

Josefov. Komenciĝis nova kurso.

Košice. Dum la Propaganda semajno faris la E. K. reklamon per ĵurnalo Slovenský východ kaj per disdono de 3000 flugfolioj por kurso. Rezulto: 40 novaj kursanoj, inter ili 15 gimnazianoj. La kurson gvidas J. Friedrich.

Mnichovo Hradiště. Prelego de s-ano Pytloun pri lia vojaĝo Danujon 5. IX.

Lubná u Litomyšle. 23. VI. E-rondeto kun samideanoj el Svitavy ekskursis al rokoj „Toulovice“ en Budislav. 17. VII. vizito de pola, hispana kaj germanaj samideanoj.

Mladá Boleslav. Librovendejo Pfeifer aranĝis en junio ekspozicion de esp.-libroj kaj gazetoj. 3. VI. EK aranĝis paroladon de s-ro K. Šolc: „Novaj konceptoj pri la esenco de materio kaj disigo de atomoj“, 31. V. parolis prof. Kožený pri la kongreso.

Moravská Ostrava. Somerajn kursojn ĉiudimanĉe al la ĉirkaŭaĵo partoprenis ĉeĥaj, germanaj kaj polaj samideanoj. — 25. VIII. laborkunveno de REL sur monto Ropička; partoprenis pli ol 100 p. Venonta laborkunveno sur monto Ostrý 15. IX.

Olomouc. 25. VII. akcepto de la traveturanta estona kongreskaravano.

Plzeň. Ekskursoj de laboristaj e-istoj 16. VI. al Drahotínský rybník, 23. VI. al Hradiště.

Staré Sedlo apud Písek. 2. VI. sukcesa ekspozicio kun propaganda parolado. Kurso finiĝis kun 18 p.

Turnov. Ekskurson al Trosky partoprenis 80 samideanoj ĉeĥaj kaj germanaj el Bakov, Gablonz, Turnov, Uher. Hradiště, Ml. Boleslav, Dolní Bousov, Reichenberg, Králové Dvůr, Sedmihorky.

Uherský Brod. Skolta ekspozicio okazinta dum junio-julio havis rimarkindan E-lakon.

Uherské Hradiště. 20. VI. kunveno de Slovaka E-Klubo por ĉeesti solenon de sendo de tero el Velehrad al la tomo de la jugoslava reĝo Aleksandro I. Festparolis prof. Th. Kilián, dir. A. Neuzil kaj urbestro M. Garlik.

Tisovec. La kunvenoj de la klubo „Comenius“ preŝkaŭ ĉiun dimanĉon en klubejo de la loka publika biblioteko. Por turisma servo estas fiksitaj pluraj esp. informaj tabuloj. La gazeto „Gemer-Maloňont“ publikigas artikolojn de la Gazetara servo.

Radio.

Esperantaj disaŭdigoj de post la lasta listo okazis el: **Brno** (samtempe *Praha I., Mor. Ostrava*):

2. I. *Sur rozoj sternite.* Opereto de B. Polách kaj J. Žalman. Tradukis J. V. Šamla. Muziko de Jar. Weinberger. Reĝio Dr. Fr. Kožík. Aktoris TRAKTanoj, kantis Vlasta Zachová, Vlad. Konopa, Stan. Hajný. Orkestro Radio-jazz, gvid. de V. Tauský.
6. II. *Esperanta horeto*: 1. *Prof. Dr. Tordý* (Universitato Brno): *Ideo de demokratio ĉe Masaryk*. 2. *Fragmentoj el sukcesaj ĉs. dramoj* kaj operoj el la lastaj jaroj (J. B. Förster, Eva. Fr. Langer, *Anĝeloj inter ni*. O. Jeremiáš, *Fratoj Karamazov*. E. Konrád, *Sorĉisto el Menloo*).
6. III. *Esperanta horeto*: Radio-filmo al 85-a naskiĝtago de prezidento Masaryk. Kompilis D. Chalupa. Tradukis MEP. Aktoris TRAKTanoj, Reĝio Josef Bezdříček.
3. IV. *Vendita fianĉino.* Antologio el komika opero de B. Smetana. Teksto de K. Sabina. Traduko de J. Šamla. Por disaŭdigo adaptis D. Chalupa. Enkonduka klarigo de Dr. Vlad. Hellert, profesoro de Universitato en Brno. Personoj kaj aktoroj: Marinjo (V. Strelcová), Joĉjo (Jos. Válka), Venĉjo (Jos. Žižka), Kecal (Vlad. Jedenáctík), Esmeralda (Vl. Zachová), Komediante (Vlad. Konůpka). Orkestro kaj ĥoro de Radio-journal, estro Bř. Bakala.
1. V. *Sur rozoj sternite.* Opereto.
5. VII. *Akvo ŝaumas sur herbejoj — arboj zumas sur rokaro.* Radio-muntaĵo pri riveroj kaj montaroj de Ĉeĥoslovakio. Kompilis K. Hrdlička kaj J. V. Šamla. Aktoris kaj kantis TRAKTanoj. Reĝion havis J. Bezdříček.
3. VIII. *Esperanta horeto.* Propaganda dialogo pri vojaĝo Ĉeĥoslovakion. Tradukis Marie Strejčková. Parolis Fr. Šlégr kaj Ant. Klimeš.
23. IX. Raportado el *Domo de konsolo* en Brno. (Promeno tra moderna malsanulejo.) La lasta parto de raportado okazis en espo.
25. IX. Informoj pri la *lastaj preparoj por la sesa kongreso de ĉs. esperantistoj*. (Sciigoj pri kongreso estis disaŭdigataj plurfoje en kutimaj tagaj ĉĥlingvaj raportadoj.)
2. X. *Esperanta horeto.* Enkonduka parolo de direktoro de la „Verda stacio“ ing. Ant. Slavík. — B. Smetana, Uverturo de la opero *Libuše*. — *La mondo parolas*, radio-sceno de D. Chalupa. Tradukis J. V. Šamla. Aktoris TRAKTanoj. Reĝio Ant. Klimeš. — Leterkesto.
30. X. *Ĉeĥoslovakio laboranta*. I.: Dr. J. B. Kozák: Enkonduko. — Miloš Weingart: *Sciencoj spiritaĵ*.

6. XI. Karel Čapek, *RUR*: Kolektiva dramo en enkonduka komedio kaj tri aktoj. Tradukis MEP. Por disaŭdigo adaptis D. Chalupa. Aktoris TRAKT-anoj.

27. XI. *Ĉeĥoslovakio laboranta*. II. Dr. Zdeněk Wirth: La arto.

Košice:

22. X. J. Maštalf: *Pri somera karavano* organizita de E. K. al Nederlando pere de esperantistaj organizoj sub gvido de Friedrich (slovaklingva).

Moravská Ostrava:

5. VI. Karel Kapek: *La moderna ĉeĥa muziko*.

18. VI. Inĝ. L. Krajc: *Al la Universala Kongreso tra Moravio*.

25. VI. Inĝ. L. Krajc: *Ekonomia administrado utila al ĉiuj*.

2. VII. K. Z. Klíma: *Karel Havlíček kiel ĵurnalisto*. (Trad. kaj legis Ot. Gadula.)

3. VII. Vojtěch Martínek: *Antaŭ ol arbo alradikiĝos*. (Trad. kaj legis Ot. Gadula.)

16. VII. Karel Kapek: *Ĉeĥa jazz-muziko*.

23. VII. Vlad. Slaný: *Folkloro en Moravio-Silezio*.

27. VII. Vlad. Slaný: *Novajoj de la respubliko*.

13. VIII. A. C. Nor: *Rajmund Chalupník*. (Trad. kaj legis O. Gadula.)

3. IX. Karel Čapek: *Kiel ĉeĥa verkisto rigardas fremdajn landojn*. (Tradukis kaj legis Ot. Gadula.)

ol dudek jaroj li losis sian sulkon en Plzeň propagandante precipe en rondoj fervojistaj, Kunlaboris en la Klubo same kiom en la Laborista Societo Esperantista. Lia nomo ne estos baldaŭ forgesita de ni.

Ŝtataj ekzamenoj. La 5—6-an de novembro 1935 estis ekzamenitaj ĉe la ĉs. komisiono en Praha pri esperanto kiel laŭvola lako en burĝaj lernejoj: Stan. Borovka, abituriento de Komerca akademio el Hradec Králové, R. Nováková, instruistino el Plzeň, K. Šolc, komercej-ĉefo el Ml. Boleslav, J. Šustáčková, instruistino el Žďár n. M., MUDr. Fr. Vaněk, kuracisto el Dolní Bousov, K. Vykruta, universitata studento el Praha. Kiel ekzamena komisaro funkciis Dr. A. Pitlák.

Legu la plej disvastigitan katalikan kaj popolan ĵurnalon **DEN**, informantan **fidinde, bone kaj rapide**. Fariĝu abonantoj de ĉi tiu ĵurnalo. — Administracio:

DEN, Brno, Dominikánské nám. n-ro 5.

Poŝtmarkoj kun esperanta surskribo - bonegaj propagandiloj. Kvin diversajn p-markojn sovetajn kun esperantaj surskriboj liveras por 18 Kč afrankite LIBROSERVO de ČAE, registrite por 20 Kč. Plej simpla mendo per pagilo al kto-nro 12.371 kun noto „Esp.-pm“.

Esperantista vivo.

Esperant-lingva edziĝfesto. La 15-an de junio 1935 edziĝis gesamideanoj Kvita en paroĥa templo en N. Jičín. La katol. pastro J. Pokorný alparolis la geedziĝantojn esp-lingve kaj ĉiuj kantoj dum la ceremonio estis kantataj en esperanto. Ĝi estis unua esperantista edziĝfesto en la urbo. Ĝi vekis tre gravan intereson inter la publiko, ĵurnaloj spontanee raportis pri la ceremonio. Ni gratulas al la juna paro geedza kaj antaŭdiras al ĝia vivo multan feliĉon.

Edziĝoj. Alojz Macek en Bratislava, sukcesa laboranto inter skoltoj, edziĝis 25. VIII. en Bratislava. — Kom. inĝ. Vlastimil Sedláček kaj Pavla Zahradníková en Zlín 27. VII. — Prof. inĝ. Lad. Krajc kaj Stanislava Veselá en Moravská Ostrava la 1. VIII. — Ili ĉiuj akceptu niajn sincerajn bondezirojn.

Naskiĝo. Prof. Miloš Lukáš kaj lia edzino en Trnava akceptu sinceran esprimon de bondeziro al si kaj al sia filineto Liduška, naskiĝinta 6. I. 1935.

Morto. Emanuel Kubásek, fervora kaj persista laboranto en Plzeň, mortis la 18. VII. 1935. Dum pli

Interpopola konduto. Originale verkis Dr. Edmond Privat. 20x13.5 cm, 154 paĝa. Eldonis Literatura Mondo Budapest. Prezo svfr. 3.— broŝ., 4.50 bindita plus 10% por sendkostoj. Unua libro de la artoscienca serio de AELA 1935. (En falsa ledo bindita, sur senligna papero svfr. 5.— plus 10%.)

Diapozitivon (vidu paĝon 34) mendis ĝis nun unusola klubo kaj tial ni ne povis fabrikigi ĝin. Ni denove atentigas pri tiu ĉi helpilo en via propaganda laboro kaj atendas informon pri novaj interesiĝantoj.

Korespondi kun ĉs. e-istoj deziras s-o Dimitr Vasilef, tajloro, Sozopol, Bulgarujo.

Japanaj studentoj de fiziko kaj de matematiko en la Universitato de Tokio deziras korespondi kun samfakaj studentoj ĉeĥoslovakaj. Ni petas niajn membrojn, kiuj havas intereson pri matematiko aŭ fiziko teoria aŭ eksperimenta, ke ili skribu al Scienca Rondo — Esperantista grupo, scienca branĉo de Tei-Dai, Imperia Universitato, Tokio, Japanio. Ni estos dankaj, se vi informos la oficejon de ČAE, ke vi obeis tiun ĉi alvokon.

Korektigo. Sur paĝo 43-a la 19-a linio de supre ĝuste devas esti: de post 1-a januaro 1936. — Sur paĝo 46-a la ĝusta sumo de enspezoj estas 3.994.30 Kč.